




NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Oktobro 2008

3. évfolyam 38. szám

Karaj legantoj!.....	3
BELA NIA PATROLANDO	3
HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO	4
Esperanto - lingvo de Zamenhof estas cent jara.....	5
LEOPARDO – KUNIKLO	9
REMEMOROJ	10
Mi amas vin.....	11
NORDHUNGARIAJ PROMENADOJ – MIŜKOLCO.....	12
ANONCOJ	14
Esperanto instruo en bazlernejo de Miŝkolco	15
Internacia Esperantista festo en Abaújszántó.....	15
Mihai Eminescu kaj Kalocsay.....	19
AL STELO	19
NOKTO.....	20
Verdaj papilietoj.....	20
Landa Renkontiĝo de Popolkanto-grupoj, la 20-an de Septembro 2008-a, Tállya	21
Eŭropa Tago de la Lingvoj.....	21
Eŭropa Tago de Lingvoj.....	22
4 000-a elsendo de Radio Vatikana.....	24
Ŝerco.....	24
Korekto.....	25
TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO	26
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo	29
Ĉu vi scias el kio pretiĝas la vinagro?.....	29
Ŝercoj.....	30
Vojaĝo nia, al la 31-a Tutpollanda Esperanto Kongreso en Lodzo	30



Arbarrando pentris D-ro Ferenc Földi (1951)

Karaj legantoj!

Kiel ĉiu monato, ankaŭ la Oktobro enhavas diversajn mondotagojn kaj gravajn tagojn de nacioj de la mondo..

Nun ni rememoras pri la 8-a de Oktobro, kiu estas Tago de la Sendependeco en Kroatio.

Ni gratulas la popolon okaze de ilia festo kaj petas ties geesperantistaron, bonvolu akcepti de ni la suban poemon.

Antun Mihanoviĉ

(1706-1861)

BELA NIA PATROLANDO*

Bela nia ci patrujo
De herooj land' karega,
Glorplena Kroatujo
Estu ĉiam feliĉega.

Kara estas ci kaj glora,
Kara kiel ebenaĵo,
Kara kiel kampo flora,
Kara kiel sorĉmontaĵo.

Ĉarma brusto, nokto ĉarma,
Klara frunt', ĉielo klara,
Varma suno, farno varma,
Akvo kaj okulo kara.

Grandaj homoj, grandaj montoj,
Ruĝa vino kaj mieno,
Fortaj tondroj, fortaj fontoj:
Mia jen patrujbieno.

Fluu Savo, Dravo fluu,
Nek Danubo ci laciĝu,
Kien monden fluas, bruu,
Ĉie ĉiu ajn sciiĝu:

Ne patrujon nian amas
Sunbrilante, ventmuĝante --,
Tombojn dum la mort' plenigas,
Dum ni vivas korbatante!

*Nacia himno.

(El Kroataj Poeziaĵoj Kun Literaturhistoria Enkonduko de Mavro Špicer – Zagreb, Kroatujo 1912)

Stefano Pál – László Pásztor
HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO
PARTO VIII-a.

Junulara grupo - 165000 Esperanto-bildkartoj.

37 pedagogoj ricevis post lernokurso la diplomon kaj permeson por instrui la esperantan lingvon. Ĉi tiel vigliĝis ankaŭ en la mezlernejoj instruado de la lingvo. En marto de 1985 en la „Rónai Sándor” Kulturdomo gelernantoj de miŝkolcaj lernejoj Bláthy Ottó Fakmezlernejo, Kossuth, Földes, Zrinyi-gimnazioj / prezentiĝis, kiuj donis memstaran programon. La evoluigon de lerneja instruado de Esperanto helpis aktive la Kultúra Klaso de la BAZ-departementa Konsilantaro. La pedagogoj, kiuj finis la intensivan lernokurson, partoprenas prefektigan kurson. Iliaj gvidantinoj estas Maria Busai, nomumita fakinspektisto kaj Ildikó Király, kunlaborantino de fremdlingva katedro de Miŝkolca Universitato.

La 19-an de aprilo 1985 junuloj fondas la Miŝkolcan Junularan Esperanto-Grupon, kiu portis nomon de Ludoviko Király. La grupo funkcias laŭ bazstatuo de HEA. Laboron de la grupo helpas Georgina Koltay kaj Ladislao Kővér.

Inter 1982-85 Barnabo Batta faris grandmezuran koloran bildkarto-eldonadon kaj dissendis de Miskolc. Sur la bildkartoj estis Esperanto-skribaĵoj. En 1982 jam la unua 20000 pecoj elĉerpiĝis. Okaze de la Budapeŝta Universala Esperanto-Kongreso prepariĝis 100000 pecoj kaj ankaŭ elĉerpiĝis kaj atingis el inter aliaj al eŭropaj landoj kaj al transmaraj landoj. En 1984-85

25000 bildkartoj pretiĝis pri memorlokoj de Abaújszántó.

De 1983 sr-o Barnabo Batta, miŝkolca, departementa konsignatulo vendis esperantlingvajn librojn, lernolibrojn, vortarojn, gramofondiskojn, sonbendojn ĝis 1985 valorantajn 100000.- forintojn, ĝis 1988 preskaŭ valorantajn 200000.- forintojn. Li farigis per Esperanto-emblemoj karto-kalendarojn, globkrajonojn kaj aliajn eldonaĵojn.

En 1985 okazis malgaja okazintaĵo. La 27-an de aŭgusto Francisko Czako, eksa sekretario de Esperanto-Fakrondo de la Hungaraj Ŝtatejoj Veturilpariga Uzino mortis. Li estis organizanto de multaj miŝkolcaj fervojistaj Esperanto-renkontiĝoj.

Miŝkolcaj esperantistoj eĉ pli frue faris en Budapeŝto ŝtatan lingvoekzamenon.

En 1986 faris ŝtatan lingvoekzamenon en la Miŝkolca Universitato loĝantoj el urboj Miŝkolco Nyiregyháza, Budapeŝto.

Nova estraro - Busto de D-ro Kolomano Kalocsay

La Esperanto-grupo Ora Duopo Kalocsay-Baghy en 1986 aranĝas fakajn prelegojn kun lumbildprojekciado, esperantlingve. Estis prelegoj pri lokhistorio de Miskolc, pri Esperanto-instruado de Szirmabesenyő, pri agrikulturaj metodoj. Estis literaturaj vesperoj.

La 23-an de januaro la grupo elektas novan estraron. Honora prezidantino estas Márta Váry, Prezidantino sr-ino Zoltán Kővári, organizanta sekretario Ladislao Pásztor, ekonomia respondeculino estas sr-ino Jenőné Rácz, junulara respondeculo: Norbert Paár, fakrondgvidanto estas Stefano Pál. / Márta Váry estas ano de estraro de HEA./

La 2-3-an de majo en Szombathely dum la Landa Esperantlingva Deklamkonkurso en pionira kategorio Marietta Szabó/Szirmabesenyő/, en junulara kategorio Livia Koncsol /Miskolc/ kaj ĉe plenkreskuloj Eszter Faragó akiris la elstaran duan lokon.

D-ro Georgina Körmeny rezignis pri la sekretariina ofico ĉe la Kuracist-Sanitaro Esperanto-Fakgrupo. La grupo kunvenis anstataŭ la Departementa Hospitalo en la Semmelweis-hospitalo en Miskolc. La grupon reorganizis D-ro Paŭlo Zaletnyik post du jara paŭzo.

La 9-an de novembro 1986 la miŝkolcanoj denove vojaĝas al Abaújszántó. Ili tie inaŭguras buston de D-ro Kolomano Kalocsay.

Je iniciato de Barnabo Batta skulptoartisto Zsolt Józsa, faris la buston. Dum la inaŭgura festo partoprenis multaj anoj de la Internacia Kalocsay-Societo. / Ĉi tiu publikplaca statuo estas la unua Esperanto-statuo en la tuta mondo./ D-ro Vilhelmo Sághy, emerita ministro, prezidanto de HEA manifestis grandvilaĝon Abaújszántó al Esperanto-memorloko. Por ties realiĝo aktive agadis Ladislao Molnár, ĉeflerneja instruisto, Jozefo Lénárt, sekretario de Konsilantaro, Gabrielo Bényei, sindikata estro kaj Stefano Homonnay, Abaújszántó-anoj.

En 1986 instruistino Maria Busai, faris sukcesan

supergradan ŝtatan lingvoekzamenon el la Esperanto- internacia lingvo. en la „Eötvös Lóránd” Sciencuniversitato

Esperanto - lingvo de Zamenhof estas cent jara 1987-1988

75 kvin jaroj - en Miskolc estas ses Esperanto-nomiĝo.

La lingvo estas cent jara - Jubileo en la Parlamentejo.

En 1987 regis sama festa etoso tutmonde, kiel en 1959, kiam en Varsovio oni rememoris je centa datreveno de naskiĝo de kreanto de la lingvo, Zamenhof.

Nun oni festis tion, ke la unua lernolibro de Esperanto antaŭ cent jaroj aperis. En jaro de la jubileo oni rememoras ankaŭ en Miskolc la lokan datrevenon kaj en la eldonaĵoj la rememoroj ricevas lokojn. Samaĵ estas la dato de la du tagoj. La 13-an de julio 1957 estis la I. Nordhungarlanda Esperanto-Renkontiĝo kaj 70-a datreveno de Esperanto. Ĉi-tage oni inaŭguras la marmormemortabulon de la Esperanto-placo.

Multaj miŝkolcaj esperantistoj vojaĝas al Varsovio, ankaŭ el la Ora Duopo Kalocsay-Baghy Esperanto-grupo. Okaze de la jubileo tiu grupo florkronas la Esperanto-memorlokojn: en la Zamenhof-strato, en Esperanto-placo, en Julio Baghy-strato, en Esperanto-parko.

Rememoro okazis pri la Kossuth-strata Esperanto-grupo.

Anoj de la Ora Duopo Kalocsay-Baghy Esperanto-grupo faris ekskurson al la fonto Esperanto.

La 16-an de marto en la Junulara domo okazis prelego pri pasinto de Miskolc kun lumbildprojekciado kaj poste la Junulara Grupo aranĝis klubvesperon.

La HEA aranĝas en la Parlamentejo sian jubilean memorkunsidon, kien ĉiuj miŝkolcaj kaj departementaj grupoj ricevas invitilon. Dum tiu ĉi ricevas Maria Busai por sia pedagoga laboro honorigon kaj Barnabo Batta honoran insignon de Mondpaca Esperanto-Movado./ MEM /

En komenco de 1987 okazis iniciato, ke estu strato en Miskolc nomita pri D-ro Kolomano Kalocsay. En intereso de tiu ĉi afero la departementa TEK petas helpon de Patriota Popolfronto plurfoje. Oni petas ankaŭ helpon de Ada Császár, kiu estas zorganto de literatura heredaĵo de D-ro Kolomano Kalocsay.Ŝi servigis tre ege valorajn indikojn., dokumentojn.

La 75. jaro - D-ro Kolomano Kalocsay-strato.

Printempe de 1988., kiu jaro estas 75. jaro de la Miŝkolca Esperanto-Movado, realiĝis la stratonomdono pri D-ro Kolomano Kalocsay. La unuan proponon de la Konsilantaro rifuzis, ĉar en Miskolc jam estas Kalocsa-strato. La 1-an de marto 1988 oni denove petis la Konsilantaron al akcepto de la propono per subskriboj de Éva Gyulai, prezidantino de la Patrujkona Komitato kaj Barnabo Batta, prezidanto de la Departementa Esperanto-Komitato. Ĉi tiun proponon la Urba Konsilantaro la 17-an de marto 1988 akceptis. Ĉi tiel okazis, ke D-ro Kolomano Kalocsay, kiu ankaŭ en 1913 gravan rolon ludis en vivo de Miŝkolca Esperanto-Movado, post 75 jaroj denove viciĝis apud nomojn de Zamenhof kaj Baghy.

La 5-an de marto 1988 apud provizoran Zamenhof-memortabulon oni metas marmortabulon, kiun inaŭguras kaj florkronas Marta Váry kaj Barnabo Batta okaze de 100. datreveno. La inaŭguran parolon diris Ladislao Pásztor, organizanta sekretario de la Ora Duopo Kalocsay-Baghy

Esperanto-grupo. Lernejanjoj de Szirmabesenyő donis festan programon.

La 27-an de majo 1988 en teatrejo de „Rónai Sándor” Departementa Kulturdomo estis Esperanto-infantago. Dum tiu rolas 200 gelernantoj de la miŝkolcaj 24. kaj 40. bazlernejo, 3.lernejoj de Leninurbo kaj bazlernejoj de Abaújszántó, Hernádnémeti, Szirmabesenyő. Ilia memstara programo havis grandan sukceson. Ĉiuj lernejoj ricevis honoran diplomon. Julio Bossányi la direktoro de bazlernejo de Szirmabesenyő ricevis „Por Esperanto” memormedalon.

Sendube la plej grava okazintaĵo de la 75. jaro estis la Landa Esperanto-Renkontiĝo la 18-21-an de aŭgusto 1988.

Dum la unua tago: Estis florkronadoj de tomboj de D-ro Ludoviko Győry Nagy kaj Ludoviko Király. Poste vizitado estis en fortikaĵo de Diósgyőr, vespere sekviĝis la Interkonatiĝa vespero.

Dum la dua tago: Estis ekspozicio el okazintaĵoj de la 75 jaroj, artista vespero, pacmarŝado kun la miŝkolcaj majoretoj.

Dum la tria tago: Estis fortikajshistoria promenado en departemento-Zemplén : Boldogkőváralja – Vizsoly – Gönc – Füzér – Sárospatak./

Dum la kvara tago: Okazis du alternativaj programoj: aŭ banado en la termal,-kaj grotbanejo De Miskolc-Tapolca kaj promenado en Miskolc-Tapolca; aŭ ekskurso al Abaújszántó.

Dum la Renkontiĝo la geedzoj Lukács faris insignitajn vir- kaj virinĉemizojn per la Miŝkolca-Televiduro kaj per la noto de la Landa Renkontiĝdato kaj verda stelo, kaj vendadis ilin por kolorigi la Landan Renkontiĝon. Ili havis grandan sukceson pro ilia ideo.

Ĝis 1988 la subaj Esperanto-memorlokoj estis en Miskolc:

1. Esperanto-placo 1957.
2. Zamenhof-strato 1960.
3. Esperanto-fonto 1960.
4. Esperanto-parko 1969.
5. Julio Baghy-strato 1977.
6. Dr. Kálmán Kalocsay-strato 1988.
7. Korrach Mór strato samjare.

Ĝis 1988 la subaj geesperantistoj estis anoj kaj delegitoj de UEA:

- D-ro Stefano Győry Nagy
- D-ro Ludoviko Győry Nagy
- Ludoviko Király
- D-ino Gózon-Fodor Jolán
- Márta Váry
- Stefano Temesi
- Jozefo Halász

Ĝis 1988 miŝkolcaj anoj de Landa Komitato de HEA estis:

- D-ro Ludoviko Győry Nagy / ĝis 1980. /
- Barnabo Batta
- Maria Busai
- Ladislao Pásztor

Post la reĝimŝanĝo / 1989 / malvigliĝo estis en historio de la Miŝkolca Esperanto-Movado. La societojn helpantaj subvencioj ĉesis kaj ne estis financa garantio por la instruado kaj kulturo kaj amuzigaj celoj.

En 1989 okazis la 25-jara jubilea festoserio de bazlernejo de Szirmabesenyő. Sr-ino Terezia Csík Bodnár kaj Maria Busai vojaĝis al Szombathely kun siaj disĉiplinoj al la Landa Deklamkonkurso kaj sukcese rolis. En februaro ili rolis kun la 40. miŝkolca bazlernejo, kiujn sr-ino Zoltán Kővári, direktorino instruis.

Somere ili partoprenis Landan Studkonkurson, post tiu en Sárospatak ili estis en departementa faktendaro.

La 17-an de novembro 1989 okazis jubilea aranĝo en „Petőfi Sándor” Kulturdomo de Szirmabesenyő okaze de 25 jaroj de Esperanto-lingvoinstruado en lernejo de Szirmabesenyő.

Ĉi tiun aranĝaĵon organizis lernejo de Szirmabesenyő, la Grandvilaĝa Konsilantaro kaj BAZ-departementa Teritoria Esperanto-Komitato de HEA. En la programo okazis malfermo, rememoroj, salutoj, literatura programo kaj ekspozicio.

En 1991 la 16-an de februaro la kunvokita ĝenerala asembleo ĉesigis BAZ-departementan Komitaton de HEA kaj samtempe fondis la Nordhungarian Esperanto-Asocion, kiun la BAZ-Departementa Tribunalo la 21-an de junio 1991 registris. La Asocio devis translokiĝi pro la tro granda ĉambrolukotizo. Unue ĝi ricevis lokon en la miŝkolca „Kossuth” gimnazio, post 2 jaroj translokiĝis en domon de miŝkolca societo de la Pedagogia kaj Metodika Instituto.

/ Miskolc, nr. 35. str. Széchenyi./ La Asocio iĝis memstara societo de HEA. Ĝia prezidanto estis Barnabo Batta, sed li poste rezignis sian oficon pro la malbona sanstato de koro.

De 1992 Maria Busai instruas la esperantan lingvon ankaŭ en la miŝkolca „Kossuth” gimnazio.

La 23-an de aprilo 1993 oni elektis samideanon Stefanon Szörényi kiel prezidanto de la Asocio. Sekretario estas Gustavo Lukács, vicprezidantino estas s-rino Istvánné Fedor, ekonomia respondeculino estas s-rino Jozsefné Szombathy. Ano de la estraro estas Nikolao Fázold.

Al nomoj de Gustavo Lukács, Nikolao Fázold, s-rino Józsefné Szombathy ne kontaktiĝas memstaraj organizadoj de Esperanto-aranĝaĵoj, lernokursoj, aŭ literaturaj agadoj.

Sed sinjoro Gustavo Lukács estis la plej bona kunaganto de la prezidanto Barnabo Batta. Eva, edzino de Gustavo Lukács same esperantisto estis, kiu multe helpis sian edzon en la poresperanto agadoj..

En 1993 la Asocio konkursis du subtenojn: al „Norda Panoramo” titola gazeto, al aranĝado de 80. jubilea jaro kaj helpo de la lingvoinstruado. Ili ricevis 30000.- forintojn de la „Departementa Mecenata Fondaĵo”, el kiu eldonis jubilean numeron de la gazeto kaj metis memortabulon en la miŝkolca D-ro Kolomano Kalocsay-strato. Inaŭguro de la marmortabulo okazis la 27-an de februaro 1994, okaze de 18. datreveno de morto de D-ro Kolomano Kalocsay.

De 1994 en la Bazlernejo de Szirmabesenyő, pro direktoroŝanĝo la lingvoinstruado de Esperanto ĉesis.

Post morto de Stefano Szörényi, la nova prezidanto de la Asocio iĝis s-rino Elizabeta Tőke Raisz.

En 1996 Ildikó Király s-rino D-ro Vu partoprenis la eminentan verkantaron, kiu verkis la hungaran-

Esperantan Mezmezuran Vortaron.

Inter 1998 – 2001 jaroj en Miskolc en la ekfunkciantaj diversaj lingvolernejoj Maria Busai instruas por plenkreskuloj la lingvon internacian Esperanto.

En la 2000. jaro s-rino Helena Stefano Fedor, instruistino faris mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon el Esperanto. Ŝi instruas la esperantan lingvon kaj al bazlernejoj kaj al plenkreskuloj.

De 2002. Maria Busai, instruistino en la miŝkolca „Saturnus” lingvolernejo instruas la esperantan lingvon por plenkreskuloj.

La „Norda panoramo” titolan informilon oni devis paŭzigi ankaŭ plurfoje pro la ĉiam pliigantaj kostoj.

En vivo de la Asocio gravaj okazintaĵoj ne okazis, dum la kunvenoj senintereseco regis. Pro ĉi tiuj kaŭzoj la membraro ne deziris vizitadi la kunvenojn.

La Asocio malfunkciiĝis en jaro 2003, oni viŝis ĝin pri la prokurlisto.

- daŭrigo sekvas -

Betty Chatterjee
LEOPARDO – KUNIKLO
Fabelo

Bonan tagon kaj bonvenu kara S-ro Leopardo!

Bonan tagon S-ro Kuniklo, mi dankas al vi pro la bonkora tagmanĝa invito.

Ne dankinde, sidiĝu kara amiko. Mi esperas ke vi estas tre malsata, ĉar mi preparis grandegan manĝon.

Ĉu vere? Mi estas malsatega. Nuntempe, mi malfacile trovas la bongustan manĝon en tiu ĉi urbo.

Bonege karega amiko! Ni manĝu!

Kia plezuro!

Jen la plej bongustaj kaj plej sanaj manĝaĵoj en la tuta mondo. Por la antaŭa manĝo, rigardu! brasiko, bruselbrasiko kaj brokolo! Mangxu kara amiko!

Ho ve, bedaŭrinde neniam mi manĝas la verdajn aĵojn.

Ne gravas! ni tuj manĝu la ĉefan pladon. Jen la betoj, la karotoj kaj.....

Nu, ho ve, bedaŭrinde mi neniam manĝas la ruĝajn aĵojn aŭ la oranĝkolorajn aĵojn.

Domaĝe estas! Sed kion vi kutime manĝas?

Kredu mi, pri la manĝo mi tute ne estas pedanta. Ekzemple, mi bone ŝatas manĝi ŝafojn kaj kaprojn. Kiam mi malsategas mi manĝas ankaŭ porkaĵon, bovaĵon, bovidaĵon kaj.....

Kaj?

Kaj kiam mi tre malsategas mi eĉ manĝas kuniklojn. Hm, mia karega amiko, pro la grandega malsatego mi devas manĝi vin!

Bonan tagon kaj bonvenu kara S-ro Leopardo!

Bonan tagon S-ro Kuniklo, mi dankas al vi pro la bonkora tagmanĝa invito.

Ne dankinde, sidiĝu kara amiko. Mi esperas ke vi estas tre malsata, ĉar mi preparis grandegan manĝon.

Ĉu vere? Mi estas malsatega. Nuntempe, mi malfacile trovas la bongustan manĝon en tiu ĉi urbo.

Bonege karega amiko! Ni manĝu!

Kia plezuro!

Jen la plej bongustaj kaj plej sanaj manĝaĵoj en la tuta mondo. Por la antaŭa manĝo, rigardu! brasiko, bruselbrasiko kaj brokolo! Manĝu kara amiko!

Ho ve, bedaŭrinde neniam mi manĝas la verdajn aĵojn.

Ne gravas! ni tuj manĝu la ĉefan pladon. Jen la betoj, la karotoj kaj.....

Nu, ho ve, bedaŭrinde mi neniam manĝas la ruĝajn aĵojn aŭ la oranĝkolorajn aĵojn.

Domaĝe estas! Sed kion vi kutime manĝas?

Kredu mi, pri la manĝo mi tute ne estas pedanta. Ekzemple, mi bone ŝatas manĝi ŝafojn kaj kaprojn. Kiam mi malsategas mi ankaŭ manĝas porkaĵon, bovaĵon, bovidaĵon kaj.....

Kaj?

Kaj kiam mi tre malsategas mi eĉ manĝas kuniklojn. Hm, mia karega amiko, pro la grandega malsatego mi devas manĝi vin!

REMEMOROJ

Doktorino Marianna Legányi

Karaj legantoj!

Antaŭ longe ni ne aŭdis jam pri doktorino Marianna Legányi, pri la poetino verkanta kaj hungare, kaj esperantlingve.

Al nia demando, sinjoro doktoro Francisko Jáki la malsupran leteron sendis al ni.

„Doktorino Marianna Legányi „Kavalirino de la Hungara Kulturo”

Marianna Legányi naskiĝis en 1940. Ŝi akiris la diplomon pri dentkuracado. Krom la laboro ĉiam interesis ŝin la religio kaj la literaturo. Pro la sindona agado sur tereno de popolklerigia arto ŝi ricevis la titolon „Kavalirino de la Hungara Kulturo”.

Antologioj, periodaĵoj, komunaj kaj individuaj verkoj konservas ŝiajn literaturaĵojn. Ŝiaj poemoj atestas pri tio, ke ŝi ege alte taksis la moralon kaj la religion. Kvankam ŝi ne havis infanojn, ŝi eldonis fablojn kiuj tre plaĉis kaj plaĉas al la juna legantaro.....Laste estas menciindaj ŝiaj tradukaĵoj. Ŝi heroe batalis por la vivo ĝis la 6-a de julio en 2008. Marianna nia meritas la transan lumon kaj la eternan ripozon.

D-ro Ferenc Jáki

Budapeŝto, 4.09.2008.”

Ni, membroj de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”, kondolencas al sinjoro doktoro Ferenc Jáki. Ni konsentas lin. Sinjorino Marianna, ripozu pace kaj la eterna lumo brilu al ŝi. Ŝiajn poemojn legante ni vidos ŝin antaŭ ni, same kiel ŝi deklamis hungare poemon de d-ro Kálmán Kalocsay (Mi amas vin...), dum la inaŭguro de la esperanto-libro-ekspozicio en la miŝkolca Kalvinana Gimnazio „Lévay, József”. dum oktobro de 2007

Geedzoj Pásztor

Kálmán Kalocsay

Mi amas vin...

Mi amas vin – ho eluzita
parol'! mi hontas diri ĝin.
Konfesi pri la sent' agita
necesus nova vortkombin',
kaj mola kiel kis' patrina,
kun ĝojolarmo de dorlot',
kaj dura, kun valid' senfina,
kiel ĝismorte sankta vot'.
Balbuta de volupto svena
kaj blanka kiel blanka ard',
jubila, flagra kaj solena,
kiel en vento la standard'.

Mi amas vin – parolo griza,
gurdita el la amindum';
dirita, ĝi forflugas disa
kiel la cigareda fum'.
Mi tamen diras ĝin ripete
kiel se adoleska bub',
plezuras en kaŝej sekrete
per flugiganta fumonub':
li ĝin enspiras kaj elspiras,
ĝis en malleva-leva tren'
lin en kapturton dolĉan tiras
facilbalanca varma sven'.

Mi amas vin – ho tamen kara
parol'! ĝi diras min al vi.
Ĝi estas la spegulo klara
de la eterna nostalgi',
per kiu mia kor' sopiras,
en via kor' je bona hejm',
per kiu mia sang' sopiras,
flui en via varma vejn',
per kiu mia karno-osto
sopiras, ke ĝi en absorb'
fandiĝu el soleca frosto
en la printemp' de via korp'.

/Eldono: Ferenc Jáki-Marianna Legányi: Kantante Vivi/Énekelve élni: Szolnok: 2006/

Sinjorino Suzana Barcsay

Estimataj Ĉiuj!

La 29-an de septembro, en j .2000, jam de ok jaroj mortis nia kara tre estimata samideanino Zsuzsanna Barcsay. Ŝi estis nur 58=jara. Ŝi estis elstarulino de la Esperanton Instruiga Komitato de HEA. Ni rememoru pri ŝi, dezirante eternan pacon al ŝi .

Estime s-ino Katarina Faragó

NORDHUNGARIAJ PROMENADOJ – MIŜKOLCO

László Boleszka

PRI LA „SANKTA TRIUNUO” HUNGARA ORTODOKSA PREĜEJO DE MIŜKOLCO

Unu el la valoraj artobjektoj de Miskolc estas la ortodoksa preĝejo, trovebla en la centro de la urbo. Multaj turistoj vizitas la altan, sveltan malfrubarokan preĝejon, starantan en ĉirkaŭaĵo de malnovaj tomboj, en la interna korto. Paŝante en la preĝejon, ili mire haltas antaŭ la baroka ikonostazo unike bela en Mez-Eŭropo. Ilia plejmulto prezentas la demandon: Kiuj estis ties preparintoj kaj gardantoj?

La kristanismo komenciĝis kiel religio de iu socia minoritato en Palestino, en eta provinco de la granda Romia Imperio. Dum ĝia disvastiĝo, gardante la esencon de la kredo ĝi adaptiĝis al la kulturo, etoso de la diversaj popoloj. La ortodoksa religio tiel estiĝis fine la oficiala religio de la helenan kulturon adoptinta Orientromia imperio, pli poste de Bizanco.

Ankaŭ la hungararo migranta en la regiono de Nigra Maro ekkonis unue la bizancan formon de la kristanismo. Inter ili multaj baptiĝis de la ortodoksa eklezio, eĉ oni ordenis unu grekan monaĥon – la sankte vivantan Hierotheos-on – kiel episkopon por la Hungaroj. Pro diversaj historiaj cirkonstancoj, komence de la novepoko en la 16-17. jarcentoj la ortodoksion, reprezentis jam preskaŭ nur la diversajpopolgrupo ĉiam pli multenombraj fuĝintaj de antaŭ la turkoj de la Balkano en Hungarion, Samaj estas ankaŭ tiuj ortodoksoj, kiuj fuĝis el Makedonio en Hungarion dum la pleja fino de la 1600-aj jaroj, kiuj eskapigis unuavice sian talenton kaj havaĵon, sed ankaŭ siajn kulturon kaj religion specialan por la Hungararo. Kvankam ili apartenis al diversaj etnoj, grekigis ilin la greka lingvo uzata en la publika vivo kaj la ortodoksa religio.

Ili okupiĝis unuavice pri komerco. La vinkomerco igis ilin riĉa kaj konata en tuta Eŭropo. En la regiono de la vinproduktanta „Montosubo” estiĝis iliaj signifaj kolonioj, el kiuj la miskolca komunumo iĝis la plej riĉa kaj plej signifa. En la komencaj tempoj ili povis havi nur luitajn nemoveblaĵojn, tial ili ne havis preĝejon, sed en iu luita konstruaĵo ili mebligis sian kapelon en la ĉirkaŭaĵo de la „Malhela pordo”. Pro ilia konsiderinda riĉiĝo, ediktoj de reĝo Maria Tereza faris ebla por ili definitive setli kaj aĉeti nemoviĝeblaĵojn. Tiamaniere iĝis eble por ili konstrui preĝejon, indan al ilia riĉeco. Oni komencis konstrui la preĝejon laŭ malfrubaroka – copfa – stilo en 1791. Kvankam ĝi ne finkonstruiĝis, oni konsekris la ikonostazon. Kiel lastaj ornamaĵoj pretiĝis la plafonbildoj, en 1807 En la malfrubaroka stilo la stilmarkoj de la baroko simpliĝas kaj ĉefe la flor-babergirlandaj, grimpotigaj plantomotivaj ornamaĵoj iĝas regantaj, kiujn oni povas trovi ĉie, en nia preĝejo.

La ikonostazo estas la ornamaĵo de la preĝeja interna spaco, kiu disigas la altaron de la preĝeoplaco. Oni rekonas ĝin unu el la plej bela kaj plej grandaj ikonostazoj de Mez-

Eŭropo. Ĝi ĉ. 16 metrojn alta, kaj oni lokigis sur ĝin ĉ. 90 bildojn. La ikonostazo integre konformiĝas al la interna spaco de la preĝejo, kreante plenan unuon kun tio. La altaro videblas nur dum la di-servoj, kiam oni malfermas la mezen, t.n. „Reĝan pordon.” Sur la plej malsupra vico oni pentris malnovtestamentajn scenojn. Sur tiun ĉi, kiel sur bazon konstruiĝas la sekvaj bildvicoj. Sur la ĉefloko, dekstren de la reĝa pordo videblas nia Sinjoro Kristo, maldekstren la bildo de la Dionnaskinta Virgulino Maria, apud ili la plej estimataj sanktuloj de la eklezio kaj de la paroĥo. La sekvaj bildovicoj klare prezentas la grandajn festojn de la eklezio, kiuj estas gravaj eventoj de la vivo de Jesuo kaj de la Virgulino Maria. Sur la supro de ikonostazo la sceno de Kalvario aludas al la ofero renoviĝanta. sur la altaro En la duoncirklon fermantan la bildvicojn oni metis bildojn de apostoloj, pli internen de profetoj kaj plej interne de la novtestamentaj sanktuloj.

Antono Kuchelmeister, viena pentristo estas la pentristo de la ikonostazo, sed la bildojn de la ĉefloko pentris anika Feodozij ukraina pentristo. La lignaĵojn de la ikonostazo kaj de la interna spaco oni faris en metiejo de majstro Nikolao Jankovics

La alia valorajo de la preĝejo estas la difavora ikono de la Dionnaskintino de Ahtir, kiu laŭ tradicio estas donaco de carino Katarina. La bildeton t.n. trono kadrigas en ornaman kadron. La kredanta pieco honoras la bildon kaj la dankemdonacoj pendigitaj ĉirkaŭ ĝi gardas la memoron de la plenumiĝo de diversaj petoj kaj resaniĝoj. Antaŭ la bildo oni povas ekbruligi kandelon por esprimi sian omaĝon al Dio, por estimo de la Dionnaskintino kaj de la Sankta Spirito, krome pro siaj mortintaj kaj vivantaj geamatuloj. Kontraŭ la ikono videblas la ornama episkopa trono. Pluraj el inter la interna spaco lokigitaj bildoj estis transmititaj el la malnova kapelo en la preĝejon. La meĉujoj devenas el elstaraj hungariaj ĉizelistmetiejoj kaj esprimas estimon. La predikseĝo iĝis en la preĝejon pro okcidenta efiko. Ĝia interesaĵo estas la hungara blazono unuigita per bizancaj insignoj /blazonsignoj/ videbla sur ĝia subo. Orgeno ne estas en la preĝejo, ĉar nur la uzo de kantovoĉo estas permesata. Dum di-servo por stari decas antaŭ Dio. Oni metis apogseĝojn apud la murojn por la gemalsanuloj, gemaljunuloj pro ilia mallongtempa ekripozo kaj apogado. La kovro de preĝejaj enirpordoj estas memoraĵoj de la fruaj miskolcaj ferprilabora metio.

La ĉi tie ekloĝintaj komercistoj per ilia agado ligis la vivon de la urbo al la vivo de aliaj urboj, landoj kaj per ĝi kaj per la arigita riĉeco trapasis la limojn de la vivo de feŭdala eturbo kaj Tiel ili iĝis ekirigantoj de la burĝa evoluo. Ili funkciigis ankaŭ malsanulejon por malriĉuloj kaj havis ankaŭ gravan lernejon, en kies konstruajo nun rigardebla estas la artotrezor-kolektaĵo de la Hungara Ortodoksa Muzeo.

La granda parto de la miskolcaj „grekaj komercistoj” forlasis Miskolc-on en la dua parto de la 1800-aj jaroj. Sed ili ne forgesis pri la preĝejo. Ili lasis gravajn donacojn, salajrojn, prebendojn al la preĝejo, el kiuj oni povis ĝin subteni ankaŭ plue malgraŭ la malmulto da kreduloj. La alŝtatigo en 1953 efektiviĝata paralizis la vivon de la eklezia komunumo. Oni konfiskis la fondaĵojn por la subteno de la preĝejo kaj ĝis nun ne redstituis ilin. La preĝejon subtenas la komunumo de la paroĥo, malgraŭ sia malforta financa situacio. Ĝi estas di-serva loko, ankaŭ nuntempe funkcia. La di-servado okazas jam hungarlingve. La etnombra eklezia komunumo apartenas al la Patriarkato de Moskvo.

Esperantigis: Adrienne, sinjorino Pásztor

(Kor. Endre Dudich 22.03.2008)

ANONCOJ

Esperanto libroekspozicio

En la Miŝkolca Departamenta Biblioteko "II. Rákóczi Ferenc", la 17-an de septembro 2008-a, je la 16-a horo estis malfermita Esperanto-libroekspozicio. La ekspozicion inaŭguris d-ro profesoro Georgo Nanovfszky, la honora prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio kaj ambasadoro, antaŭ kelkaj jaroj, de Hungario en Ruslando kaj Singapuro.

La titolo de la libroekspozicio estis: UEA 100-jaras. Sed ĉi eventon faris grava la fiksitaj celoj de la Eŭropa Jaro de Lingvoj en la 2008-a jaro, krome la Esperanto-lingvoinstruado kaj movado en Miŝkolco, havanta 95-jaran datrevenon. Ĉi-imaniere ni dankodiras al la homoj kaj organizacioj, sendintaj informilojn, reklamtekstojn, dokumentojn kontribuante al la sukceso de la ekspozicio (UEA, OIK: al la bibliotekistino Anna Marosvölgyi, s-roj László Gados kaj d-ro Lajos Molnár, Jenő Jósvai), krome al la estraro de la bibliotekoj kunlaborantaj unu kun la alia, al s-ro d-ro profesoro prezidanto Georgo Nanovfszky kaj al la ĉeestintoj. El inter ili ni aparte dankas la reprezentantinon de OIK: s-inon Ilona Bőde kaj d-ron Árpád Máthé: la estron de la "Kalocsy"- Societo.

La organizanto de la ekspozicio estis s-ino Adrienne Pásztor, ŝia helpanto: la edzo, László Pásztor





Fotis László Pásztor

Esperanto instruo en bazlernejo de Miŝkolco

Karaj legantoj!

Mi ne scias, ĉu vi scias aŭ ne, sed nun mi informas vin, ke en Miŝkolco, en bazlernejo Komlóstetői mi instruas Esperanton jam pli ol dudek jarojn kaj en tiu ĉi lernejo mi havas entute 30 gelernantojn, 6 dekdu jaraj, 14 ok jaraj kaj 10 naŭ jaraj. Eĉ mi gajnis Comenius projekton "Kunlaboro inter lernejoj", kio signifas, ke mi kunlaboros kun angla kaj germana bazlernejoj, kie oni instruas ankaŭ Esperanton. La ĉefa temo de tiu dujara projekto estas Esperanto. Mi instruas Esperanton en fakrondo, post la devigaj lecionoj, sed oficiale. Mi esperas, ke mia sciigo donas ĝojon al vi, ĉar mi edukas esperantistojn por la estonto. Amikan saluton!

S-ino Ilona Fedor Hungario

Internacia Esperantista festo en Abaújszántó

25-jara datreveno de la estigo de la Kalocsay-memorĉambro en Abaújszántó
by Molnar Laszlo — Laste modifita: 2008-08-05 12:51

1, Rememoro de la trovinto kaj kunfondinto de la Memorĉambro kun kelkaj konkludoj

Antaŭ 25 jaroj, la 3-an de aŭgusto, okaze de la 68-a UK de Esperanto estis solene inaŭgurita la Memorĉambro omaĝe al d-ro Kolomano Kalocsay. Sube Vi trovos neforgeseblajn rememorojn, travivaĵojn de la loka trovinto kaj iniciatinto de la estigo de la Memorĉambro omaĝe al d-ro Kolomano Kalocsay. La hazarda renkontiĝo kun japana esperantistino en la urbo Szeged donis al mi la eblecon por ekkoni la vivon kaj laboron de Kalocsay kaj rezulte de la persona serĉado trovi lin, pri kiu ĝis tiam ankaŭ la kuracistoj sciis nenion.

Li laboris kiel infektologo, dr-o de medicinaj sciencoj, verkisto, poeto, tradukisto, eĉ profesoro de la esperantaj lingvo kaj literaturo. La aranĝon partoprenis elstaraj eminentuloj, estraranoj, reprezentantoj de la internacia scienca kaj publika vivo, liaj geamikoj, samklasanoj, gelernantoj de baz- kaj mezlernejoj, multaj interesigantoj, simpatiantoj. La ĉeestintoj - laŭ la adresoj, propramene enskribitaj en la Gastlibro, fariĝinta movadhistoria dokumento - alvenis el la plej diversaj landoj, ekz. el Svisio, Nederlando, Svedio, el Federacia kaj Demokratia Germanio, Francio, Hispanio, Sudafriko kaj el aliaj landoj.

La departamenta tagĵurnalo *Észak-Magyarország* /Norda Hungario/ informis jene pri la okazintaĵo sub titolo: *Esperantista festo en Abaújszántó*:

"...reprezentantoj de tiel multe da nacioj neniam vizitis samtempe la komunumon de bela pasinteco de la departemento ", aŭ "Ĉi-loke en Abaújszántó la partoprenantoj ne bezonis interpretiston, nederlandanoj kaj hungaroj, svedoj kaj francoj, germanoj kaj angloj bonege komprenis unu la aliajn, ili ĉiuj parolis nur unu lingvon, Esperanton. La tuttaga riĉenhava programo komenciĝis en la kulturdomo, kies scenejo estis dekorita de homalta Kalocsay-portreto kaj Esperanto-emblemo, faritaj el vivaj, freŝaj floroj. La ĉeestantoj povis sekvi la programerojn laŭ la dulingva programo. Post la kulturprogramo la festado pludaŭris en la korto de la domo, en kiu estis fondita la muzeeto. Salutarolojn diris Kardos József /Jozefo Kardos/, estro de la Eturba Konsilio en Abaújszántó, Csiszár Ada /Ada Ĉisar/-estrarano de HEA, prizorganto de la spirita heredaĵo de Kalocsay, Batta Barnabás /Barnabaŝ Batta /, vicprezidanto de la Departementa Komitato de HEA en Borsod-Abaúj-Zemplén kaj Molnár László, mezlerneja instruisto. La Memorĉambro solene malfermis kaj transdonis por publika uzo Borsos Árpád /Arpad Borsos /, prezidanto de la BAZ-departamenta Kleriga Sekcio. En la memorĉambro-interalie troveblas la personaj uzobjektoj, libroj, premioj ktp. de Kalocsay.

Verŝajne, ĉi-loke unu el la plej neforgeseblaj minutoj por la gastoj estis, kiam ni eksciite kaj profunde kortuŝite aŭdis la originalan surbendigitan voĉon de la Majstro. Fine de la ĉi-tiea ceremonio, fare de ĉiuj ekster- kaj enlandaj reprezentantoj estis plantita belega, blanka piceo - simbolo de la eterneco, senmorteco, la t.n. Memorarbo de Kolomano Kalocsay. Dum la plantado estis aŭdeblaj konvenaj muzikoj kaj finfine aeren suprenflugigitaj cent kurierkolomboj. Nur multe pli malfrue post la festotago mi komprenis, kial la gastoj saltadis levante siajn manojn. Ili klopodis kapti almenaŭ unu plumon por kunporti hejmen kiel memorigan donaceton. Post la bonetosa komuna tagmanĝo estiĝis personaj kontaktoj, adresmanĝoj, babilado k.s.

Poste, dum la urborigardo okazis la florkronado de la memortabulo en la K-strateto kaj tiu de la tombejo de la patrino de K.K. Antaŭ la forveturo en la kelo de ĉefkuracisto dr-o Angyalos László /Ladislao Andialoŝ / grandsukcese okazis internacia vinkorkurso kaj memkompreneble vingustumado. Post 25 jaroj mi povas diri, ke multaj vizitas la Memorĉambro. Lastfoje ĉe ni estis 50 polaj gastoj, inter ili esperantistoj gvide de la prezidantino de la Pola Esperanto Asocio, s-ino Halina Komar. Mi pensas, ke la estigo de la Memorĉambro estis ekzemplodona, sekvinda evento. Inter la konkludoj mi ŝatus emfazi: Esperanto ankaŭ ĉi-loke pruvis, ke ĝi estas nuntempe la plej taŭga ilo por interpopola komunikado. Fine, permesu al mi citi unu el la opinioj de la ĉeestintoj: "Elkoran dankon pro unu el la plej interesaj kaj agrablaj tagoj de mia vivo".

/ Noran Brown el Anglujo "

Kion diri? Koregan dankon pro la afablaj vortoj. Molnár László ME CTFK pensiulo-docento

Memorĉambro kun kelkaj konkludoj <http://www.liberafolio.org/Members/molnar/Kalocsay>”

2, La festo okaze de la 25-jara datreveno de la memorĉambro de d-ro Kolomano Kalocsay, la 27-an de septembro 2008a

Je iniciato de geedzoj Pásztor, la urbestro de Abaújszántó ĝoje konsentis festi la 25-jaran jubileon de la estigo de la Kalocsay-Memorĉambro en Abaújszántó. Post salutvortoj de sinjoro urbestro Georgo Madár, la vicprezidanto de HEA salutis kaj hungarlingve kaj esperantlingve la festantojn ankaŭ en nomo de Jozefo Baksa: prezidanto de HEA, kaj laŭtlegis la rememoran mesaĝon de d-ro László Molnár pri la inaŭgura festo de la Memorĉambro.

S-ino Adrienne Pásztor transdonis la salutojn de la forrestantoj:

Osmo Buller (ĝenerala direktoro de UEA, kiu dum la inaŭguro estis tie en 1983)

D-ro László Molnár docento (iniciatinto de la fondo de la Memorĉambro)

d-ro Lajoš Molnár, kiu estas estro de la programo Lingvolanĉilo, prezidanto de la Medicina Esperanto Fakgrupo en Budapeŝto

kaj Aurora Bute, prezidantino de la Rumania Esperanto-Asocio.

Laŭ ŝia peto s-rino Pásztor laŭtlegis belegan poemon (AL STELO) de la rumana poeto Mihai Eminescu (Mihaj Eminesku) tradukitan de d-ro Kolomano Kalocsay.

En la programo krome rolis: poeto de Abaújszántó, kiu estas samtempe ankaŭ orkrona popolkantisto: István Nagy (Stefano Nadj) unue kantis hungare du muzikigitajn poemojn de la granda hungara poeto Aleksandro Petőfi, poste sinjoro István Nagy deklamis sian poemon. La du kantitaj poemoj estas esperantigitaj de K. Kalocsay kaj aperis en la poemaro de Petőfi - Libero kaj Amo.

De Petőfi, ankaŭ alia poemo estis prezentita: Fine de Septembro – (esperantigita de K. Kalocsay), kiun deklamis esperantlingve Danielo Asztalos (Astaloŝ), junulo el urbo Nyíregyháza.

En la memorĉambro je memoro de d-ro Kalocsay nia gasto el Oradea s-ro Attila Makai metis florkroneton, nome de la geesperantistoj de Oradea (Rumanio).

Ĉe la surstrata Kalocsay-busto okazis la programo de la kvar lernantinoj de Abaújszántó. La infanoj estis elegante vestitaj, tenis en la manoj malhelbluan-koloran librokovrilon, en kiu estis la teksto de fabeloj tradukitaj de Kalocsay kaj prezentitaj de ili.

Ilia eksterajo, krom la prezentmaniero, estis elstara. La infanoj laŭvideble ĝuis, ke ili rolas, brilokule kaj ne enrigardante la tekston diris, deklamis la du fabelojn tradukitajn de K. Kalocsay. Ilia prezento estis eminenta, tute ne videbvliĝis, ke ili ĝeniĝus.





Fotis László Pásztor

Ekde 25 jaroj tie ne okazis instruo de Esperanto. Ekkomencis ĝin nun la instruistino Ildikó Széppataki, kiu faris bonegan laboron per la instruo de la infanoj. Ili brile ekzamenis sin per la prezento de la fabeloj.

Ĉi-maniere ni esprimas nian dankon kaj gratulojn al la lerneja direktorino pro la permeso instrui Esperanton, al la instruistino pro la bonega rezulto kaj al la infanoj pro ilia entuziasmo. Kaj tie, kaj ĉe la memortabulo de Kalocsay-strateto okazis florkronado kaj kandellumigo. Ĉe la memortabulo sinjoro Attila Makai, prezidanto de la Esperanto-Klubo de Oradea salutis la partoprenantojn de la memorfesto kaj deklamis kaj hungare kaj Esperantlingve poemon de alia rumana poeto. La poemo Dojno estis belsona, kara poemo. Ni ĉiuj ĝojis pri la belaj poemoj, verkitaĵoj de rumaniaj aŭtoroj, tradukitaĵoj parte de K.Kalocsay. Poste ni faris pietatan viziton al tombo de la patrino de d-ro Kolomano Kalocsay. La patrino mortis, kiam la infano Kolomano estis nur 2-jara. Apud la tombo ni rememoris ŝin per poemo de nekonata hungara aŭtoro. Sinjorino Pásztor prezentis la poemon kaj hungare kaj esperantlingve. Dank' al sinjoro doktoro Endre Dudich, la poemo-preĝo: Mia Patro Nia, ĝis, simile al la pli fruaj poemoj, tre ŝatata de la partoprenantoj de la memorfesteto.

Post meto de la memorkrono kaj kandellumigo, ni reiris enurben kaj komenciĝis la ĝuo de la vinrikolta festa programo de la setlejo.

Je nia granda ĝojo la partoprenantoj venis el multaj lokoj: venis gesamideanoj el urboj Oradea, Niregyháza, Tiszavasvári, Szolnok, Eger kaj Miŝkolco. Nur unu sola evento estis bedaŭrinda: unu esperantisto malsaniĝis. Lin kun edzino, la savaŭtomobilo portis al iu miŝkolca hospitalo. Ni esperas lian baldaŭan resaniĝon.

Post la hejmenvojaĝo, sinjoro Attila Makai pasigis unu tagon en Miŝkolco, por ekkoni la vidindaĵojn de nia urbo.

Ni reatendos lin.

Adrienne, sinjorino Pásztor

Mihai Eminescu kaj Kalocsay

Karaj niaj legantoj!

La prezidantino de Rumania Esperanto Federacio: s-ino Aurora Bute (Timișoara) petis nin, publikigi belegajn poemojn de la rumana nacia poeto Mihai Eminescu (Mihaj Eminescu), 1850-1889, geniulo, kiu vivis nur 39 jarojn sed verkis belegajn kaj valorajn poeziaĵojn. Li studis en Vieno kaj Berlino.

Liajn nun prezentatajn poemojn esperantigis d-ro Kálmán Kalocsay kaj ili aperis en sia poemaro Tutmonda Sonoro. Sinjorino Aurora Bute per ĉi poemoj deziras levi la lumon de nia festeto de la 25-jaraĝa Kalocsay-memorĉambro en Abaújszántó, la 27-an de septembro 2008-a..

Ni dankas por la belaj donacoj kaj nun transdonas ankaŭ al vi, karaj niaj legantoj!

s-ino Adrienne Pásztor

Mihai Eminescu

AL STELO

*Ho, longa estas voj', de ni
ĝis tiu stelobriilo,
ĝis nin atingas la radi',
forpasas jaromilo.*

*Jam eble en senfina Blu'
delonge mortis brulo,
sed la radio tamen plu
briladas al okulo.*

*Pri l'morta stelo la radi'
ankoraŭ plu atestas.
ĝi estis, ne albrilis ĝi,
vidata, ĝi ne estas.*

*Sopiro same. Se ĝi jam
en nokt' forbrulis tute,
la lum' de l'estingita am'
plu sekvas nin salute.*

Trad. Kálmán KALOCSAY

Mihai Eminescu
NOKTO

*Nokto. Milde kaj ruĝblue en la forn' la fajro brulas,
en angul', ĝin rigardante sur kanap' min sternas mi,
la animo endormiĝas, la palpebrojn fermas mi,
estingiĝas lum' en domo, sorĉa song' min mole lulas.*

*Nun vi tra l'mallumo venas, alridetas min proksime,
blanka, kiel neĝa vintro, dolĉa, kiel printemp-tag'.
Sidu en la sino, kara, ĉirkaŭringu min per brak',
kaj rigardu miajn palajn vangojn ame kaj intime.*

*Per balzamaj, blankaj brakoj, rondaj brakoj, vi min kole
ĉenas, kaj sur mia brusto via kapo kuŝas nun,
poste vi la blankan manon levas, kaj ĝi tuŝas nun
songe mian tristan frunton, harojn forkareas mole.*

*Mian frunton en trankvilo lulas la kareso flata,
min kredante dorma, ruze, kisas vi per arda tuŝ'
min sur la okuloj fermaj, sur la frunto, sur la buŝ',
kaj vi ridas, kiel songo ridas en anim' ravata.*

*Ho, karesu, dum la frunto estas glata kaj serena,
ho, karesu, dum vi junas, kiel suno de aŭror',
dum vi puras, kiel roso, dum vi dolĉas, kiel flor',
dum ĉi-frunt'ne estas falta, kaj ĉi-kor'ne maljun-svena.*

Trad. Kálmán KALOCSAY

Verdaj papilietoj

Estimataj!

Okaze de Tago de Lingvoj ni invitas al blogo "Verdaj Papilietoj", kie estas pli da informoj pri agado en nia lernejo: <http://akelpollando.blogspot.com/>
Saluton!

Krystyna Worobiei - Pollando

Landa Renkontiĝo de Popolkanto-grupoj, la 20-an de Septembro 2008-a, Tállya

La 20-an de 2008-a en Tállya aranĝis la „Kővirág” (Ŝtonfloro) Popolkantogrupo-Asocio de vilaĝo Tállya, kaj la Asocio de la Hungaraj Korusoj kaj Orkestroj (la KÓTA) kiel kunulorganizantoj, la Landan Renkontiĝon de la Popolkantogrupoj. Kial gravas la popolkantogrupoj de la vilaĝoj? Ni povas respondi tiun demandon per vortoj de Zoltán Kodály:

„La popolkanto estas ne nur la resonado de la hodiaŭa vilaĝo vivo, sed ankaŭ spegulo de la tuta hungara animo.”

En la programo unue saluton diris Gabrielo Mezei, la pastoro de tiu evangelia preĝejo, kiu donis lokon al la tuta aranĝaĵo. La Renkontiĝo ricevis lokon en tiu preĝejo, en kiu estis baptita en la jaro 1802-a nia fama revoluciestro el la 1848-1849-aj jaroj, Lajos Kossuth. Sur la preĝejmura marmortabulo legeblas la sekva teksto:

„Perei povas nur tiu popolo, kiu rezignis pri si mem!

Kossuth, Lajos (Ludoviko Koŝŝut) „

La tabulon oni metis tien la 19-an de Septembro 2002, omaĝe al la 200-jara datreveno de la naskiĝo de Lajos

Kossuth. La popolkantogrupoj per siaj kantoj prezentis sin laŭ la sekva vico:

„Kővirág” Popolkanto-Rondo de Tállya (gvidanto s-ino Ferencné Kalina), „Barnabó Ŝivák” Popolkanto-Rondo Abaújszántó (gvidanto s-ino Ferencné Kalina), Popolkanto-Rondo de Sajóvámos, Popolkanto-Rondo de Nyírlugos, „Ora Aŭtuno Popolkanto-Rondo de Záhony, Popolkanto-Rondo de Zalakomár, Popolkanto-Rondo de Érpatak, kaj la „Tilangli” Popolkanto-Rondo de Sellye.

Fine de la Renkontiĝo, la tuta ĉeestantaro kune kantis la hungaran popolkanton, komenciĝantan per „Sub la ĉitaraj montoj jam bfalas la neĝo”...

La Renkontiĝon fermis post faka interkonsiliĝo komuna tagmanĝo kaj vinkela vingustumado. Oni organizis la aranĝaĵon okaze de la MONDOTAGO de MUZIKO, kaj aludis denove al diro de Zoltán Kodály:

„La nacio komencas malrapide konsciiĝi pri tio, kiel grandan trezoron havas la popola tradicio.”

Ja, la citroakompano de kantoj de la popolkanto-rondo de Zalakomár, tiom allogis nin, ke ni volonte aŭskultus ilin dum la tuta nokto. La popolkanto-rondo de vilaĝo Sellye (Ŝejje) estis la solaj kantantoj per gvido de korusestro. Sed ĉiu rondo prezentis un elstaran, eksterordinaran travivaĵon, tiel mi ne povus vicigi ilin laŭ boneco. Ja, ĉi tie ĉiu samrangis. Ĉi evento estis amika renkontiĝo kaj ne konkurso. Ni estis partoprenantoj de admirinda koncerto.

Ni gratulas al ĉiu grupo! Al la ĉeforganizanto sinjorino Kalina, ni dankas la inviton.

Adrienne, sinjorino Pásztor

Eŭropa Tago de la Lingvoj

Dum la 26-an, okaze de Eŭropa Tago de la Lingvoj, en la budapeŝta Landa Fremdlingva Biblioteko, **profesoro, d-ro Dudich, Endre** prezentis la II-an Katalogon de la Biblioteko pri la Fajszikolektaĵo de Esperanto-lingvaj libroj. La prezento sukcesis bone, d-ro Iván Bujdosó faris videofilmon pri la evento.

Ni gratulas al la pretigantoj de la Fajszikolektaĵo, al ĝia prezentinto d-ro **Endre Dudich**, kaj deziras bonan sanon al ili. La Biblioteko OIK kontentas kaj dankas ilian laboron.

Tiun Katalogon II-an pretigi estis grandega laboro. Kaj la tuta prilaboro de la tutkolektaĵo ne

estas finita, ĉar la Biblioteko havas ankoraŭ ankaŭ aliajn dokumentojn de tiu kolektaĵo, al kiu atendas la memstare sinanoncantojn, senegoismajn helpantojn.

Ĉiu helpo bonvenatas! Vi povos anonci vin ĉe la bibliotekistino Anna Marosvölgyi. Atingebleco ŝia estas:

marosvolgyi.anna@oik.hu

Adrienne, s-rino Pásztor

Eŭropa Tago de Lingvoj

Karaj Geamikoj!

La 26-an de septembro 2008. kadre de la Eŭropa Tago de Lingvoj en la Lingvostudio de la hungaria Nacia Fremdlingva Biblioteko (NFB) antaŭ 42-membra, esperantista publiko Profesoro D-ro **Endre Dudich**, honora prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio prezentis la ĵus aperintan, II-an volumon de la Katalogo Fajszí.

La titolo de la prelego estis: **Katalogo de "ne-ekzistanta" literaturo, II-a volumo**

En la **enkonduko** de la prelego ni aŭdis du citaĵojn kaj du komentojn:

I. "Esperanto estas karikaturo de la eŭropaj lingvoj."

La bona karikaturo estas tre valora, ĉar ĝi akcentas la esencajn kaj karakterizajn trajtojn.

II. "Esperanto estas favorpreza enirbileto al la eŭropaj lingvoj."

Tio estas - sendepende unu de la alia - la opinio de pluraj afrikaj, japanaj kaj ĉinaj esperantistoj.

Kaj tio el la vidpunkto de la estonto tute ne estas indiferenta.

Antaŭaĵoj

Károly Fajszí (1911-2004) ekde 1966 kreis sian mondfaman, esperanto-kolektaĵon de pli ol 11.000 libroj, 1305 volumoj de 224, diversaj revuoj (grandparte propramane binditaj).

Post la esperanto-bibliotekoj de Vieno, Londono kaj Roterdamo ĝi estas la 4-a, plej granda kolektaĵo en la tuta mondo. La kolektaĵo estas defendata de la Hungara Ŝtato de post la jaro 1982. Pro tiu ĉi kolekta laboro **Károly Fajszí** ricevis du altajn, ŝtatajn distingojn: en 1987 la oran Ordenon de Laboro kaj en 1994 la Malgrandan Krucon de Respublika Ordeno.

La I-an volumon de la Katalogo jam en 1991 eldonis la Nacia Fremdlingva Biblioteko, kies tiama direktoro estis **Jenő Juhász**. Ĝia amplekso estis 542 paĝoj kun 5110 artikoloj. **Patakiné Mária Czeller** redaktis tiun unuan volumon.

Zsuzsa Barcsay en la jaro 1997 pretigis sian diplomlaboraĵon pri la Kolektaĵo Fajszí en la Esperanto-fako de la Universitato Loránd Eötvös, Budapeŝt.

La kolektaĵo ekde la jaro 2001 estas fermita kaj gardata, prizorgata fare de la Nacia Fremdlingva Biblioteko.

La historio de la II-a volumo

Post preparlaboroj de **Patakiné Mária Czeller**, **Elza Novák**, **Zsuzsa Barcsay** kaj **Károly Fajszí** la II-an volumon redaktis **György Zsebeházy**.

Lian laboron subtenis flanke de la Hungaria Esperanto-Asocio **Oszkár Princz**, ĝenerala sekretario, poste **Endre Dudich**, vicprezidanto, **László Szilvási** afergvidanto, flanke de la NFB **Sutáné Elzbieta Zielinska**, kaj **Balázs Wacha** kunlaboris kiel lingvisto-profesiulo.

En la jaro 2005 oni eĉ dufoje prezentis la II-an volumon: kadre de la Ekumena Esperanto-Kongreso en Piliscsaba, je peto de **Farkasné Éva Tatár**, kaj dum la 90-a UK en Vilno.

En la lastaj jaroj kun aprobo de ĉefdirektorino de la NFB **Tiborné Mender** pretiĝis la indeksoj laŭ temoj kaj aŭtoroj dank' al la entuziasma kaj engaĝiĝinta laboro de bibliotekistino **Józsefné Böde**. Ŝi popularigis la kolektaĵon Fajszki ankaŭ kadre de intervjuo en la Radio Bartók la 17-an de septembro 2007.

Decidan, financon subtenon ricevis la preseja efektivigo de la II-a volumo de Profesoro **Humphrey Tonkin** (*Hartford University, USA, Esperanto Studies Foundation* - 80%) surbaze de propono de **D-ro Detlev Blanke** (*Gesellschaft für Interlingvistik, Berlin*), kaj la Hungaria Esperanto-Asocio - **József Baksa**, prezidanto - donis 20 %-ojn.

La II-a volumo estis prezentita ankaŭ la 29-an de majo 2008 en Vilno, fare de **D-ro Árpád Máthé**, kaj en julio en Roterdamo, dum la UK, fare de **József Baksa**.

La II-a volumo mem

- enhavas 6249 artikolojn sur XIV+506 paĝoj,
- la uz-instrukcioj estis kompletigitaj - je propono de Profesoro **Tonkin** - ankaŭ per angla versio.

Ĝiaj laŭtemaj proporcioj:	Artikoloj	%
0 Ĝeneralaj verkoj	924	14,8
1 Filozofio, psikologio	152	2,4
2 Religio, teologio, ateismo	251	4,0
3 Sociaj sciencoj	685	11,0
4 Naturscienco, matematiko	90	1,4
6 Aplikataj sciencoj	335	5,4
7 Arto, distriĝo, sporto	242	3,9
80 Lingvistiko	1549	24,8
82 Literaturscienco, beletro	1627	26,0
9 Geografio, biografio, historio	397	6,3
	-----	-----
	6249	100,0

La II-a volumo enhavas esperantajn-nacilingvajn vortarojn de 40 lingvoj, krome vortarojn de Basic English, Ido, Okcidental, Romanid kaj Volapük, kaj esperanto-lernolibrojn en 14 lingvoj.

Fine de la prelego Profesoro **Dudich** denombris plurajn hungariajn verkistojn, kiuj aperas - esperantlingve - en la katalogo, kune kun iliaj tradukistoj.

Kadre de la Lingvotago estis ebleco viziti la zorgeme kunmetitan ekspozicion pri la kolektaĵo Fajszki, kiun preparis

Józsefné Böde, Lászlóné Anna Marosvölgyi kaj Profesoro D-ro Endre Dudich.

Dankon kaj gratulon al la preleganto kaj al ĉiuj kunlaborantoj de la Nacia Fremdlingva Biblioteko!

D-ro Lajos Molnár kaj D-rino Julianna Farkas

4 000-a elsendo de Radio Vatikana

la 5-an de oktobro 2008 Radio Vatikana disaudigos sian 4 .000-an (!!)
elsendon en esperanto.

La unua elsendo okazis en la nokto inter la 17-a kaj la 18-a de aprilo 1976
(tio signifas inter la Sankta Sabato kaj la Paska Dimanĉo), en la kadro de
la programo «Kun ni en la nokto». Kiel raportite en "Espero Katolika" 7/1976

http://www.esperokatolika.org/ek19761980/ek1976_07.htm#5

tiu unua elsendo konsistis nur el kelkaj vortoj de meditado, legitaj de
s-ino Elizabeta Rzemnyi - Puracchio, hungarino loĝanta en Romo. Laŭ la
planoj ĝi estus devinta esti pli ampleksa kaj surondiĝi duonhoron pli
frue, sed pro la escepta longa daŭro de la paskaj ceremonioj oni devis
lastmomente limigi la daŭron kaj prokrasti la elsendon.

Ekde la 25-a de aprilo 1976, kontraŭe, estis disaudigata kvinminuta
programo, registrita de la menciita sinjorino kaj de patro Giacinto Jacobitti.
Sekvis pli ampleksaj kaj regulaj elsendoj ekde la 2-a de januaro 1977, ĝis
la nuntempo.

Pri la aparta statuso de la E-elsendoj de Vatikana Radio, oni povas legi
klarigojn en Espero Katolika 6/1988

http://www.esperokatolika.org/ek19861990/ek1988_06.htm#13

Por aŭskulti:

http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Antonio De Salvo
INFORMITALE 131
Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

Ŝerco

Kvar homoj sidas ĉirkaŭ iu tablo. Iu botelo estas sur la tablo. La unua homo prenas la botelon,
trinkas el ĝi, poste metas la botelon sur la tablon. Ankaŭ la dua homo prenas ĝin, trinkas el ĝi,
poste metas ĝin sur la tablon. Ankaŭ la tria faras same. Ankaŭ la kvara homo trinkas el la
botelo, metas ĝin sur la tablon kaj alparolas:

- Ĉi tio estas petrolo!

La unua homo konsideras ĝin kaj alparolas:

- Jes, tio estas.

Esperantigis László Pásztor

Korekto

Karaj legantoj!

En la septembra gazeto ni komunikis biografion de Tibor Sekelj. Tiun materialon ni ricevis de la Landa Fremdlingva Biblioteko (Budapeŝto), de la retejo „Vajdasági Magyar Irodalom www.palatabla.zenith.org.yu/irodalomCD-Web/eletrajzok/szekely.htm - 9k - kaj de la www.hetnap.co.yu/uj/index.php?zg=3042&no=117-24k”

Sinjoro Zlatko Tišljar anoncis al ni, ke la biografio enhavas erarojn. Pro tio, mi sendis petleteron, kaj de la altestimata samideano Dimitrije Janičić (el Beogrado) mi ricevis la malsupran, seneraran biografion de Tibor Sekelj.

Jen, lia letero al mi:

„...Pri lia vivo mi sendas al Vi tekston el libro LEKSIKONO DE AKTIVAJ JUGOSLAVIAJ ESPERANTISTOJ, eldonita en Borovo (Kroatio) 1985.

Verkis Marinko Gxivoje. Por mi kaj por cxiuj tio estas "oficiala" biografio de Tibor Sekelj...”

SEKELJ TIBOR,

naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Spiška Sobota (nuna Ĉeĥoslovakio kaj tiam Hungarujo). Tuj poste, kune kun siaj gepatroj, li migris pli suden, kaj fariĝis jugoslavia civitano, ekde la fondiĝo de Jugoslavio.

La infanaĝon li pasigis en Banat. Studo: Mezlernejon finis en Nikŝiĉ (Montenegro), en 1934 li licenciatiĝis pri juro en la universitato de Zagreb, sed intertempe okupiĝis pri pentrado kaj skulptado, lingvoj kaj ĵurnalismo, estis filma dramaturgo.

Kariero: Kiel malkvieta, sciema vojaĝanto kaj naturamiko, li antaŭ la dua mondmilito (1939) forlasis Eŭropon kaj migris al Argentino, kie li firmigis sian pozicion kiel ĵurnalisto. En 1944 li surgrimpis la 7.035 metrojn altan Akonkagvon, en 1945 ripetis la agon. Sekvis (en 1945/46) ekspedicio al Mato Grosso kaj al Patagonio. Dum du jaroj li studis antropologion kaj arkeologion en Bonaero. Post arkeologiaj esploroj en Bolivio, li vojaĝis tra Amazonio (1948/49), kie li trovis la kanibalan Tupari-tribon, kun kiu li kunvivis kvar monatojn. Pluraj vojaĝoj kaj ekspedicioj portis lin al Venezuelo (1950), en Gvatemalo li studis la civilizon de la majaoj kaj tiun de la aztekoj en Meksikio.

El tiuj vojaĝoj rezultis dekduo da libroj inter kiuj estas aparte menciindaj: "Tempesto super Akonkagvo", "Tra Lando de Indianoj", "Kie la Civilizo Ĉesas", "Vojaĝo Ekster la Tempo", "Kumeŭaŭa, Filo de la Ĝangalo", "La Konkero de la Montoj", "Sunsubiro en Paradizo", "Gambo Rafiki". Laborlingvoj liaj estas la hispana, la serbokroata kaj la Esperanta.

La Brita Reĝa Geografa Societo lin elektis sia membro, kaj la argentina registaro lin honoris per la ordeno "Ora Kondoro" En 1954 li revenis al Jugoslavio, de kie li entreprenis novajn vojaĝojn: en 1958 tra Azio, restante 6 monatojn en Nepalo, unu jaron en Hindujo, kaj kvar monatojn en Japanujo, en 1962-63 li gvidis Karavanon de Amikeco tra Afriko.

Agado por Esperanto: Esperantistigis en 1929, tuj alveninte al la universitato en Zagreb, kunlaboris en fondado kaj gvidado de la Zagreba Akademia Esperanto Klubo. En Sud-Ameriko li perfekte kombinis sian esploristan kaj verkistan laboron kun tiu de E-pioniro. Fariĝis por li kutima laboro alveni al iu loko aŭ lando kie ne ekzistis movado, krei interesigon, gvidi kursojn kaj fondi societon aŭ asocion. Tiel li fondis kvardekon da grupoj kaj ok landajn asociojn. Ekde 1946 li estis komitatano de UEA, kaj reprezentis tiun organizon en la UNESKO-konferencoj de 1956 (New Delhi) kaj 1958 kaj 1960 (Parizo); vojaĝis tra Azio kiel speciala sendito de UEA por esplori la eblecojn de Esperanto en tiu kontinento, kaj starigis E-movadon en Hindujo kaj Nepalo. Li fondis APO - Agado en Proksima Oriento – por pionira laboro en Aziaj kaj Afrikaj landoj. Li estis prezidanto de la Internacia Geografa Asocio, redaktis "Geografia Revuo"-n. Li estis komitatano de UEA. Kunlaboras en multaj E-revuoj

kaj gazetoj, prelegis en ISU kaj en multaj landoj (en Esperanto kaj en 8 naciaj lingvoj, kiujn li regas). Honora prezidanto de Meksika E-Asocio. En 1964, kiam UEA rifuzis lian proponon pri ekago por enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon, laŭ nova, universala metodo, li kune kun sia frato Antonije fondis kaj dum ĝia okjara funkciado prezidis la Intemacian Instituton por Oficialigo de Esperanto (IOE). Ĝia agado estis dividita en 9 branĉojn de la homa aktivado, en kiuj ĉirkaŭ 500 kunlaborantoj el multaj landoj aktivis. Fine, pro la kontraŭbatalo al IOE flanke de I. Lapenna, Sekelj decidis ĉesigi la Instituton kaj forlasi la E-Movadon.

En 1980 reaktiviĝis, kaj en 1981, dum la UK en Brasilia elektita komisiito de UEA por la Movado de nealiancitaj landoj, en kiu funkcio li ekagis energie. Dum la funkciado de IOE Sekelj redaktis 65 numerojn de la monata revuo "IOE-Gazeto" (poste „Esperanto-Gazeto“). Li redaktis kaj eldonis "Mondmapo"-n, la unuan tian verkon kun ĉiuj nomoj en Esperanto. Verkoj: "La Trovita Feliĉo. Novelo legebla por kursfinintoj" (Buenos Aires, 1945), "Koresponda Esperanto-kurso en 32 leteroj" (Buenos Aires, 1946, Gvatemalo 1952, Meksikurbo 1952, Beograd 1957), "Tempesto super Akonkagvo" (trad. el la hispana H. E. Garrote - Beograd 1959), "Nepalo malfermas la pordon" (originale verkita en Esperanto, eldonis STAFETO, presita en Ljubljana, 1959), pluraj el tiuj libroj tradukitaj en kelkajn lingvojn; krome aliaj verkoj en aliaj lingvoj (indikitaj en "Kariero"). Reprezentita per poemo en "Reehoj. Jugoslavia Poemaro" (La Laguna, 1961). Kunaŭtoro de la aŭdvida struktura metodo por elementa kurso de Esperanto "Vojaĝo tra la mondo", aŭtoro de la jenaj libroj: "Ridu per Esperanto" (IKS, Zagreb, 1973), "Premiitaj kaj aliaj noveloj" (IKS, Zagreb, 1974), "Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo" (IC Stafeto 1979) "Mondo de travivaĵoj" (Edistudio, Pizo, 1981). li verkis ankaŭ "Muzeologian terminaron" (20 lingva), kompilis kolekton de poemoj de la triboj de la mondo, kiu sub la titolo "Elpafu la sagon" estas akceptita por eldono flanke de UEA.

Literaturo:

LSS 5/1951;

"Nepalo malfermas la pordon";

"Ko je ko u Jugoslaviji", Beograd;

"Enciklopedija Jugoslavije", Zagreb, 1962;

Bibliografio de verkoj eldonitaj en diversaj lingvoj en "Mondo de travivaĵoj", p. 279-281;

Intervjuo de J. Paripoviĉ en la revuo "Studio" 933, de la 20-a de februaro 1982 kaj de M.

Gjivoje en "Monato" 4/1982

TIBOR SEKELJ

TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO

Tradukis Terezija Kapista

-daŭrigo -

PARTO II-a

Du rajdantoj – kaj ankoraŭ unu

La aglaĉoj de supre observantaj vivon de l' stepo rimarkas eĉ la hamstron elirantan el sia subterejo kaj kapreolinon, subirantan al riverbordo ĉe trinkejo.

Nun kelkaj tiuj birdoj en rapida flugado akompanis iun movon. Ili

ĉasadis pro ebla predo, minaco al ili ne ekzistis. Alia afero kun hamstroj. Ilia felo tremis aŭdante la hufbatojn de ĉevaloj el malproksimo, kiam tamburadis surteren. Nun tiu tamburado plifortiĝis kaj en milde ondanta stepo super la altaj herboj ekaperis siluetoj de du rajdantoj.

La pli aĝa kun mallevita brido firme sidis en sia selo. La blua silka „del”-o, mantelo, kun flavaj borderoj kaj larĝa flava zono donis al lia horizontala figuro pli dignan aspekton.

La pli juna rajdanto estis knabo, laŭ kies vizaĝo tuj videblis, ke li ne estas pli ol naŭ jara.

Per kalkanoj de siaj krudŝtofaj botoj senĉese instigadis sian longharan ĉevaleton, ĉar nur tiamaniere sukcesis teni la distancon kun pli aĝa rajdanto. Kaj tio gravis. Tiamaniere li povis temp-al-tempo ŝeti rigardon al lia vizaĝo por trovi sur ĝin kuraĝigon.

Sed sur lia vizaĝo li nun povis diveni nenion.

Lia vizaĝo estis trankvila kaj la rigardo vagadis ien malproksimen.

Li rememoris pri afero okazinta antaŭ dek jaroj. Ie ĉi tie en la sama regiono.

Ĉi tie li, la juna Jisugej, ĉasante per falko en proksimeco de rivero Onon, rimarkis ĉaron akompanatan de la rajdisto. Alproksimiĝante li rekonis Jekeĉileduan, el tribo Merkita. Kaj ĉar li estis venonta el regiono de tribo Olkunout, li komprenis, ke l’tribo fama pro belaj virinoj, la rajdanto venigas en ĉaro, al si fraŭlinon por edzino.

La familio de Jisugej ĉiam estis en malbonrilatoj kun Merkitoj. Ne estus superflue al li fari iom da malicaĵo, li ekpensis.

Returnigis la ĉevalon kaj rerajdis al sia jurto kaj tuj revenis kun siaj du fratoj Tajŝit kaj Oĉigin. Sur siaj rapidegaj ĉevaloj ili ĉirkaŭrajdis la monteton al kiu supreniradis Jekeĉiledu, akompanante la ĉaron. Kiam de supre li ekvidis la tri rajdantojn, tuj li sciis, ke nenion bonan li povas atendi de ilia flanko.

Kun timo ŝetis rigardon al sia bela fianĉino, preskaŭ serĉante solvon en ŝiaj okuloj por eliro el senespera situacio.

- Forfuĝu, karulo - diris ŝi kiel eble plej rapide per ĉevalo. Savu vian vivon kaj mi ja elturniĝos.

La merkita rajdanto returnis la ĉevalon kaj plej rapideble suben kuris aliflanken de sur la deklivo, kie la tri rajdantoj atendis lin.

Ekvidinte lin, kontraŭ flanke de la loko tiuj tuj postkuris lin. Horon-du tra monteta stepo kaj poste apud riverbordo de Onon. La distanco inter ili restis ĉiam la sama kaj la ĉevaloj komencis pro la laciĝo nerveze tremi dum ŝvita ŝaŭmo lavis ilin.

- Aŭdu, frato, kial ni postkuras tiun fraŭlon? Ĉu vi ne vokis nin helpi al vi forrabi la fianĉinon? Ni eĉ forgesis pri ŝi kaj ĉasas la Merkiton kiu neniun faris kontraŭ ni – ekkriis Tajŝit dum galopo, al sia frato Jisugej.

- La fratoj ekridetis pro sia sensaĝa agado. Ili deĉevaligis pro momento ripozigi la ĉevalojn. Kuŝante en alta herbo kaj rigardante sian ruf-ĉevalon, Oĉigin mallaŭte ekkantis:

*Kun la stepĉevala rapido kutima
vi konatiĝos dim vizit’ pilgrima,
diboĉvente kurante tra valo:
En la selo de la virĉevalo
eĉ la distancego estiĝas proksima.*

Ili denove enseliĝis kaj ekrajdis.

Kvankam nek ilin iu pelis, nek iu postkuris ilin, tamen ili denove rapidigis la ĉevalojn por ne perdi la predon. Kaj vere malantaŭ la monteto ili ekvidis la ĉaron tiratan de jungita duĝiba kamelo al la loĝloko Olkunout.

Unu el la fratoj prenis la bridon de kamelo, la dua aliris la kamelon kaj Jisugej venigis

la ĉevalon al la ĉaro. Sur vizaĝo de ploranta knabino al li estis rekonebla vera belulino. De sub ŝia silka pinta ĉapo, ambaŭflanken pendis du dikaj harplektaĵoj, fiksitaj inter larĝaj arĝentaj agrafoj kaj en la fino entiritaj en du arĝentajn tubojn. Tiu harornamaĵo de riĉaj Mongolinoj faris konvenan kadron al vizaĝo kiu tuj ravigis Jisugejon.

- Knabino, bela, - komencis Jisugej per milda voĉo – la homo, kiun vi priploras, jam estas for kaj vi ne esperu lian revenon. Sed ankaŭ ni ne estas malplibonaj ol li. Amikoj ni estas viaj. Venu kun ni kaj estiĝu mia edzino. Vi estos la reĝino de mia jurto kaj patrino de miaj infanoj.

Respondo ne okazis. Dume la junuloj direktis la ĉaron al la jurto de Jisugej.

La tempopaso pruvis, ke Jisugej pravis. Hoelun, kiel nomiĝis la junulino, estiĝis lia edzino kaj patrino de kvin infanoj kaj Temuĝin estis la plej aĝa. Jes, tiu sama Temuĝin, kiun un rejdus kun sia patro tra la lando de Olkunoutoj.

Subite Jisugej streĉis la bridon kaj lia ĉevalo abrupte haltis. Temuĝin sekvis lian ekzemplon kiom li scipovis per etaj manoj regi la viglan ĉevaleton.

La knabo direktis rigardon al direkton, kiun okuloj de lia patro explore observis. Post kelkaj momentoj li rimarkis nubeton da polvo kiu treme blankis ĉe kurbiĝo inter du montetoj. Lia koro ekstremis. Ĉu eble venas malamikoj por ataki ilin? Kvankam li rajdas ekde sia kvara jaro, Temuĝin neniam ĝis nun distanciĝis de sia familia loĝloko. El parolado de aĝuloj li povis scii, ke en la stepo – malantaŭ de ĉiu monteto - povas aperi malamiko.

Sub polva nubeto aperis nigra punkto. Iom post iome ĝi estiĝis rajdanto. Li estis sola. Do, ne estas kazo por timo, pensis Jisugej kaj spronis la ĉevalon. Samkiel li iris antaŭen, sen iu troa rapideco, la silueto de rajdanto kiu venis al ili renkonten, estiĝis ĉiam pli klara. Fine la alvenanto alrajdis ilin kaj ĉiuj haltis en kelkpaŝa distanco.

Dum silente kaj senĉese ili observadis unu la alian, Temuĝin demandis sin, ĉu ili havas amikon aŭ malamikon antaŭ si. Pro ekscito lia gorĝo kuntiriĝis. Finfine la alvenanto ekparolis:

- Bonvenon en nian regionon, bofrato Jisugej! Kiu malfeliĉo aŭ bonŝanco venigis vin ĉi tien kaj kien vi intencas?

Jisugej dankis la bonegon al Dejseĉen, el tribo Olkunout, el kiu ankaŭ lia edzino devenas kaj daŭrigis:

- Jen, mi venigis tiun ĉi junulon, mian plej aĝan filon, al lando de liaj onkloj. La knabo kreskas, laŭ kutime mi venigis lin por espereble en via amika tribo trovi al li konvenan fianĉinon.

Kiam tion ekaŭdis, la knabo ruĝiĝis ĝis oreloj. Ne pro tio, ke tio estus novaĵo al li, sed jen, neniam pli tio estis parolo antaŭ la nekonata homo, tio malagrabis al li. Por iom kaŝi sian ĝenon li rektiĝis en sia selo, levis la kapon, komencante ordigi la zonon de „del”-o. De sub la rando de peltoĉapo li rigardadis Dejseĉenon, kies nomon ofte menciis la patrino, rakontante aventurojn el sia naskiĝregiono.

Dejseĉen kun sperta rigardo observis la knabon. Fine, kun milda tono, ekparolis:

- Belaspekta estas via filo, mi devas konfesi. Li scipovas sidi surĉevale kaj el liaj okuloj radias inteligenteco. Ne estos malfacile trovi junulinon por li. Vi, ja scias, ke nia tribo vartas junulinojn, famajn laŭ la beleco. Ni ne ŝatas militi, ni preferante interfratiĝas kun niaj najbaroj, pere de niaj filinoj kaj fratinoj. Pro tio mi proponas, ke ni kuniru al la jurtejo.

Ili ekrajdis facilgalope al direkto, el kiu Dejseĉen estas veninta. Post iom da tempo tiu ekparolis:

- Mi cerbumas bofrato mia, pri tio, ke mi ankaŭ havas filinon. Ankoraŭ eta ŝi estas, eble tro febla por via filo, kaj kiu scias, ĉu ŝi belas, ĉu ŝi havas aliajn ecojn, kiuj ornamas multajn aliajn knabinojn? Ĉion tion, kiel patro mi ne povas taksi. Kaj, eble ne superfluas por ankaŭ ŝin vidi, se vi jam venis tien ĉi. Ĉiuokaze mi invitas vin tranokti en mia jurto, por morgaŭ – post bona ripozo – daŭrigi al tiu serĉota. Vi, el tribo Kijata estis ĉiam fieraj, riĉaj,

diligentaj mastroj, veraj ĥanoj kaj ni ĉiam edukis niajn filinojn por ke ili dignoplene povu sidi apud vi.

Postirante la monteton antaŭ la alvenantoj vastis rigardo al dekduo da rondaj, blankaj jurtoj. Brutaro staris ĉie ĉirkaŭe, la junuloj ankoraŭ alvenigis gregojn kaj arojn da ili el malproksimaj paŝtejoj.

Kiam ili atingis la jurton de Dejseĉen, la hundoj ekbojis kaj ekmutis nur kiam la mastro akre alkriis ilin.

- Bonvolu en mian jurton kaj ripozu kiel ĉe amikoj - diris la dommastro kaj montris al kvadrata enirejo de jurto, kies ronda konusforma tegmento brilis sub la lastaj sunradioj antaŭ la sunsubiro.

- Ni daŭrigos -

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo 70 Jaras la TEJO!

Fonditade s-ino E. van Veenendaal-Bouwes, en Groet, Nederlando en 1938 kun la nomo Tutmonda Junular-Organizo. La nua nomo estis alprenita en 1952. En 1956 TEJO iĝis la junulara sekcio de UEA. En 1971 la financo kaj administrado de TEJO estis plene integritaj en tiujn de UEA. (Vidu Historio de TEJO de N.Saletti, 2008-a Jarlibro 12 p.)...

TEJO havas asociajn kaj individuajn membrojn. Asociaj estas la membroj de la landaj sekcioj aliĝintaj al TEJO. La individua membraro de TEJO konsistas el la individuaj membroj de UEA malpli ol 30-jaraj (MJ-T, MA-T, DM-T, DMJ-T) Ili aliĝas rekte kaj ricevas servojn de TEJO. La kotizon de individua membro oni povas pagi pere de la kotizperanto de UEA aŭ rekte al UEA. En 2007 TEJO havis 389 individuajn kaj 3888 asociajn membrojn.

Junulara delegito (JD) estas minimume 16-jara kaj maksimume 29 jara. Por fariĝi JD oni petu formularon de sia ĉefdelegito aŭ de la Centra Oficejo, aŭ uzu la formularon en la Reta Jarlibro.

Pri TEJO, vi povos legi pri abunde en la 2008.jara Jarlibro, de la 50-a paĝo.

Ĉu vi scias el kio pretiĝas la vinagro?

Jam dum la plej progresintaj antikvaj kulturoj – ankaŭ la Egiptanoj, Persoj, Grekoj, Romianoj kaj Babilonanoj – produktis vinagron. Ili aplikis ĝin kiel refreŝigan trinkaĵon, medikamenton, konservon kaj manĝaĵpligustumigilaĵo. Ra romiaj legioanoj portis vinagron en siaj akvoboteloj, ĉar la forte malpurigita akvo estis sterilizita tiu maniere. Hipokrato la plej fama antikva epoka kuracisto – vivanta en la 4-a jc. Antaŭ kristo – uzis ĝin por kuraci spirvoĵaj malsanoj kaj misdigestoj. Oni priskribis – en la 1-a jc. post Kristo -, la preparmanieron de produkto de la vinagro. Tiutempe ties bazmaterialo estis unuavice: vino, figo kaj hordeo.

Sed nuntempe iu ajn alkoholenhava trinkaĵo – vino, pommosto, biero, rizvino – povas esti la ekira bazmaterialo de la vinagroprodukto. Oni kristaletizas ĝin per vinagro-bakterio, kaj liberaere efektiviĝas la vinagriĝo. Niatage la uzataj vinagrospecioj estas: vinvinagro, ŝaumvinagro, fruktovinagro, spicitaĵoj, rizvinagro ks.

/Adrienne s-rino Pásztor tradukis la tekston de la Televidprogram-gazeto de 29. 09.2008 ĝis 5.10.2008/www.mindmegette.hu/

Ŝercoj

Móricka malfrue alvenas hejmen el la lernejo. Lia paĉjo severe prirespondigas lin pro la malfruo.

- 7 Iu oĉjo perdis sur la bulvardo centforintan bankbileton
- 8 kaj nur nun li trovis ĝin.
- 9 Kian rilaton vi havis pri tiu mono?
- 10 Mi staris sur ĝi.

La ŝoforo pro iu kolizio senkonsciiĝis. Li rekonsciiĝis nur sur la hospitala lito. Li ĉirkaŭrigardis

Senkonsciante:

- 10 Kie mi estas?
- 11 En la dektria. – diras la flegistino.
- 12 Kio estas ĉi tiu dektria? Ĉelo, aŭ hospitala ĉambrego?

Esperantigis László Pasztor

Vojaĝo nia, al la 31-a Tutpollanda Esperanto Kongreso en Lodzo 20-24. Aŭgusto 2008-a

La 19-an de Aŭgusto ni ekvojaĝis per trajno, ke ni atingu nian fincelon Lodzon. Dum nia 12 hora daŭra vojaĝo ni traveturis tri landojn: Hungarion, Slovakion kaj Pollandon.

En Slovakio unue ni atingis mian naskiĝurbon Košice, kiun nun estas ĉefurbo de Orienta Slovakio kaj estas grandega urbo. Tie ripozas por eterne la hungara grandregnestro moŝto Francisko Rákóczi la II-a. En tiu urbo iam forta estis la esperanto vivo, direktita de: s.roj Milan Zvara, Michal Kucin, ... kaj de aliuloj.

Nia dua haltejo estis Eperjeŝ, laŭ sia nuna nomo Prešov. En la 12-a jc. estis ĝi fondita kaj multe havas ankaŭ nun renesancstilajn domojn.

Post tiu sekvis multaj pli malgrandaj stacejoj, kie nia trajno ne haltis. La regiono variis, sed nia trajno kuris ĉefe sur montetaj, montaj regionoj, kie dense staris la pinarbaroj, aŭ miksite kelkloke per tilioarboj, En apudeco de Lelihov aperis la sekherbaj amasoj, kiuj similas al kvastaj ĉapeloj. Muszyna estis la limstacejo, la unua haltejo en Pollando. Poste sekvis Stary Sacz, kie klastron fondis Kinga (la hungara reĝidino, filino de hungara reĝo Adalberto la kvara) la edzino de „Gracema Boleslavo” pola reĝo, en la 12-a jarcento. Poste sekvis Nowy Sacz, kie ni ekflagrigis nian esperanto-flagon por saluti la prezidantinon de PEA. Sinjorino **Halina Komar** kvankam loĝas tie, tiam jam ankaŭ ŝi survojis al Lodzo. Nowy Sacz urbon fondis *la ĉeha reĝo Vencel* en 1292. En la mezepoko tiu estis grava stacejo de la komerco inter Hungario kaj Pollando. En Tarnow ni haltis nur kelkminutojn, sed ni rememoris la kun Poloj same havintan polan heroon oĉjon (Jozefo) *Bem*, kiu estis heroo batalanto de nia 1848-1849-a liberecbatalo. Li naskiĝis kaj estis entombigita en Tarnow.

Nowy Sacz same gravan rolon ludis en komercaj cirkonstancoj inter Hungario kaj Pollando. De tie mi spertis, ke la limojn de la agrikulturaj terenoj, signas ĉie arbo-grupoj, (kiel sur la iamaj hungaraj terenoj estis kutimaj) ofte ni vidis arbarojn, la grundo jam bruna estis, ne tiel blankecaj kiel sur la montaj regionoj. De Krakovo ĝis Varsovio (ĝis la nuna pola ĉefurbo) nia trajno jam pr. flugis. Krakovo estas la administraciae instanca centro de Sud-Orienta Pollando., la grandsignifa rezidejo de la iamaj polaj reĝoj. Enhavas la urbo multegan artvalorajn artobjektojn. Ni nun rememoris la sur ties ĉefplaco starantan preĝejon, kies dikan sonorilegon ankaŭ ni karestuŝis. Kaj la tiam aŭdita pravdiro nun vere praviĝis: Post 32 jaroj ni

reveturis, revenis en Pollandon.

La granda stacidomo Warsawa - Centralna estas konstruita tute el ferbetono. Sur la plej supera etaĝo estas la ĝiĉetoj. Palmoj estas tie, marmorplanko, la muroj el vitro estis faritaj. Eleganta estis, sed nenie ni vidis eĉ unu benkon por ripozi. Tie la homoj rapidis, kuris, por la plej rapide atingi hejmon, ĉar estis jam vespere. La relparoj kuŝis unu apud la aliaj, sed atingi ilin, eblis nur de la unua etaĝaj movantaj ŝtuparoj. Nia trajno malfruis, kaj trovi la ĝustan relparon inter la menciitaj cirkonstancoj, estintus zorgodona. Sed, polaj gejunuloj helpis nin kaj ĝustatempe ni atingis la pluirantan trajnon al Lodzo. Tie, **Zofia Smiszek** (la kasistino de la lodza filio de PEA), atendis nin, ekkonante nin pri la esperanto-flago, servante ĝi kiel konigilo. Ŝi akompanis nin al la tranoktejo estinte ĝi en la sama kulturdomo kie okazis la 31-a Tutpollanda Esperanto Kongreso, de la alia tago. Ni lacaj post la tuttaga vojaĝo, tre danke ĝojis, ke la distanco estis nur 200 metroj de la stacidomo ĝis nia tranoktejo.

Dum nia tuta restado ni sentis multegajn signojn de la multjarcenta amikeco inter la popoloj hungara kaj pola.

La 20-21-22-23-an de Aŭgusto 2008 la geedzoj-Pásztor el Miskolc, partoprenis la 100-jariĝan Esperanto-Kongreson de Lodza Filio de Pola Esperanto-Asocio en urbo Łodz. La 20-an de Aŭgusto ni havis liberan programon. Ni promenis ĉirkaŭ la stacidomo kaj la Kulturdomo. Ni vidis antaŭ la Kulturdomo statuon de iu pola marŝalo. Fine ni povis elripozi la antaŭtagan longan vojaĝon.

21. Aŭgusto 2008.

Je la 9-a kaj 30, la Esperanto-standardo alvenis, portita de gvidantoj de la lodzaj esperantistoj. Poste de la Eĥo-ensemblo koruso/virina koruso/ sonis la Esperanto-himno. Ĉiuj partoprenantoj kantis ĝin kune kun ili. Tiu estis emociiga sento.

La korusanoj estis vestitaj en longaj verdaj roboj per blanka ŝalo ĉirkaŭ la kolo. Tre elegantaj estis. Mi estis scivolema: ĉu la korusanoj nur ellernis la esperantokantojn sed ne estas easperantistoj, aŭ estas male. Ili eminente parolis la internacian lingvon, ili estis veraj esperantistoj.

Poste sekviĝis malfermo de la kongreso de **Halina Komar**, prezidantino de PEA. Nome de la lodzanoj salutis samideano **Robert Kaminsky**, prezidanto de la lodzaj esperantistoj.

Sinjoro **Tadeusz Ejsmont** la verkisto prelegis pri historio de Esperanto - movado de urbo Lodzo. Lia libro /Esperanto-movado kaj edukado/ estis inter la kongresaj materialoj por ĉies. La libron li dediĉis por ambaŭ ni.

Poste **Elżbieta** Kalczewska raportis pri organizado de UK-2009 en Bjalistoko.

D-ino Helena Koutny prelegis pri instruado de Esperanto en Universitato Adam Mickiewicz de Poznan. La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto sub ŝia gvido en la Universitato Adam Mickiewicz./UAM/

Poste arkivaj dokumentaj filmoj sekviĝintus pri la juda kulturo, sed la preleganto bedaŭrinde ne alvenis..

Dum la tuta kongreso funkciis la libroservo, kie estis ebleco por aĉeti librojn, bildkartojn kaj ceterajn esperantaĵojn.

Posttagmeze estis busa ekskurso al la juda tombejo kaj tie en la sinagogo ni aŭdis prelegon pri la juda kulturo. La juda tombejo estis fondita en la 19. jarcento kaj apartenas al la plej grandaj judaj tombejoj en Eŭropo. Ĉirkaŭ 180000 tomboŝtonoj konserviĝis sur 40,2 hektara teritorio. Laŭ tradicio en la tombejo troviĝas diversaj partoj por viroj kaj virinoj. Ĉe la ĉefaleo situas familiaj tomboj. Inter ili staras la plej granda juda tombo en Pollando, la tombmonumento de entreprenisto Izrael Poznanski. Tiu estis kovrita en la kupola parto per orumita mozaiko, kaj estis grandefika konstruaĵo. La mozaikaj tomboj sekvas la diversajn stilojn de arkitekturo kaj

skulptoarto, kiuj regis en la 19. kaj 20. jarcentoj. Multaj tomboj en secesia stilo /el komenco de la 20. jarcento/ sin kvalifikas al la plej belaj en Pollando. Absoluta escepto kontraŭ juda tradicio estas tombo de Ruta Akawie. Prezente sur ĝi siluetoj de homoj estas, kio estas malpermesita en judaismo.

La tutan terenon ĉirkaŭas brikaj muroj kaj inter ili troviĝas dua muro, kiu dividas la tombejon al du partoj – „la mondo de vivantoj kaj la mondo de mortintoj.” En la tombejo staras unika antaŭentombiga domo. Sur monumentojn de viktimoj de hitlera faŝismo ni metis florojn. Preskaŭ la tuta tombejo estas bone prizorgita, sed tamen havas diversajn partojn de la plurjarcentaj tombarejoj, kiujn jam enkreskis la hedero en la arbaro.

Vespere estis interkona kaj arta programoj: ni aŭdis poeziaĵojn de Julian Tuwim de la fama pola poeto kaj esperantisto, kies statuo estas sur promeneja strato de Lodz kaj oni diras: se iu karestuŝas tiun, iĝos ĝoja. Ni klopodis agi tiel, kaj pretiĝis multaj fotoj kun li. Krome ni aŭdis poemojn pri Lodzo.

22. Aŭgusto 2008.

Busa ekskurso estis tra urbo Lodzo, dum kiu unue ni metis florbukedon da diamantoj al memortabulo de L.L.Zamenhof /Zamenhofá 1/3.

Poste ni iris al vilao de Edward Herbst. En jaroj 1870-1879 formiĝis eŭrope skale unika fabrik-rezideja komplekso /pastra muelejo/. Grava elemento de la komplekso estas vilao de lodzaj entreprenistoj Edward kaj Zofia Herbst. Edzino de Edward estis filino de fama lodza kotona potenculo Karol Scheibler. En la ĉefkonstruaĵo-vilao oni rekonstruis ĉambrojn, kiuj substrekas stilon de domo de lodza entreprenisto el turnopunkto de la 19. kaj 20. jarcentoj. Ĉe teretaĝo tre riĉe ekipitaj ĉambroj en reprezenta karaktero. Kabineto de dommastro, spegula ĉambro kun novrokoko - ekipaĵo, orienta salono, salono de floroj, ĉasista ĉambro, manĝejo kaj bala salono. En la unua etaĝo estis rekonstruitaj loĝejaj ĉambroj de domposedantoj: apartamento de dommastrino, vestejo kaj dormoĉambro, vira apartamento kun dormejo, saloneto kaj biblioteko. Oni rekonstruis ankaŭ ĉambron de avino, filino kaj gastoĉambron.

Poste ni iris al la tekstilindustria muzeo, kiu estis la „blanka fabriko” de Ludwik Geyer. Tie ĉi ni vidis diversajn tekstilindustriajn malnovajn maŝinojn, simplajn kaj komplikajn.

Posttagmeze okazis diskuto pri federaciigo de Pola Esperanto-Movado. Poste ni faris viziton al la Ortodoksa preĝejo. /En najbareco de la kongresejo/

Vespere arta programo okazis:

1. Kabareto „Bi-Ba-Bo” prezentis spektaklon „Kretumi sur barilo”.
2. „Kapelo de kvartalo Supero” prezentis urban folkloron.
3. Arta prezentado de gelernantoj de 31 Liceo je la nomo Zamenhof en Lodzo.

23. Aŭgusto 2008.

Antaŭtagmeze estis kunsido de PEA-delegitoj. Sed jam dum tiu busa ekskurso ni ekiris al la Palaco de Poznanski kaj al la MANUFAKTURA – unu el la plej grandaj el Pollando kaj Eŭropo, centro de komerco, kulturo kaj amuzo. Ĝi estas situata en centro de Lodzo en renovigita teksta fabriko de Izrael Poznanski sur 27 hektara tereno. Fabriko, palaco de fabrikposedanto, domoj por laboristoj kreas duan en Lodzo historian kaj industrian komplekson el la 19. jarcento. En la Manufakturo krom multaj vendejoj oni povas viziti kinejon Cinema City kun 15 salonoj / unu kun 3D-ekrano/, ripozcentron kun kegloludejo, grimpmuro, atletejo, kelkajn muzeojn, ekspoziciojn kaj restoraciojn, kafejojn kaj barojn. Izrael Poznansko lasis grandegan palacon en la Manufakturo-komplekso. Ĝi estas la plej impona kaj granda fabrikista palaco en Eŭropo. La palaco kunligas multajn stilojn kaj estas nomata Lodza Luvro. En la palaco troviĝas Muzeo de Historio de urbo Lodz. En unu el

kabinetoj oni prezentas historion de familio *Poznanski*. Apartaj ĉambroj estas dediĉitaj al meritaj lodzanoj: *Karl Dedecius*, *Julian Tuwim*, *Artur Rubinstein*, *Jan Karski*. En subtera parto oni povas rigardi ekspozicion pri historio de industria Lodzo.

Ne nur la palaco, sed ankaŭ ĝis nun konservita ruĝbrika fabriko estas simboloj de multnacia Lodzo.

Posttagmeze en iu romkatolika preĝejo de Lodzo estis esperantlingva diservo.

Vespere estis arta programo:

1. „**EĤO**” *Virinkoruso* prezentis siajn kantojn /en 1982 tiama prezidanto de vira koruso „EĤO” en Lodzo sr-o Bogdanski en kunlaboro kun lodza estraro de PEA fondis Virinan Esperantan Koruson „EĤO”, kies unuajn robojn donacis la Filio. Ekde tiu tempo *Mag. Ing. Włodzimierz Wesolowski* tradukis 17 kanzonojn el pola, latina, germana kaj japana lingvoj. La koruso multfoje koncertis glorante la internacian lingvon okaze de diversaj en,-kaj eksterlandaj esperantaj aranĝoj./
2. *Zúza Kornicka* muzikis per gitaro kaj kantis. Ŝi, la bela junulino kantis, gitarludis belege.
3. Koncerto de **JOMO: Jean-Marc LECLERQ** – naskiĝinta la 10-an de Oktobro 1961./ Li estas franca esperantista kantisto. Li koncertas multlingve, sed esperante sola per gitaro, kantante ĝenerale konatajn originale enesperanto verkitajn, kaj tradukitajn popol- kaj aliajn dancigajn kantojn. Li rolis nepriskribeble bonege. Faris grandiozan bonhumuron. La publiko starante longdaŭre aplaŭdis, reaplaŭdis lin por kanti. Kaj li revenis ĉiam kaj kantis ĉiam novajn kantojn, ĝis tiam ne aŭskultitajn. Aliuloj kun samideaninoj dancis dum lia tuta kantado. Dancis ĉiuj jarklasanoj. Dancis ankaŭ sinjoro Mandrak kaj la tuta estraro de la PEA. Ni neniam spertis similan viglan okazintaĵon. La tuto esti ekstaziga, neforgesebla.
4. Kontakto estas: jomo@esperanto.nu

Dum la tuta kongreso regis la plej korvarmiga amika etoso. La landkongresa LKK organizis la programojn al eminenta. Sinjoro Kaminsky diris al mi: „la plej malfacila estas en la organizo: por trovi la ĝustajn homojn al la specialaj taskoj. Sed post la trovo, jam daŭras ĉio glate” La LKK trovis vere la plej ĝustajn homojn. Ni gratulas ilin ankaŭ nun pro tiu speciala ĝuo. La 24-an de Aŭgusto ni vojaĝis hejmen, ĉar ni havis hejme nepasigeblajn taskojn por aranĝi.

Inter niaj kongresaj dokumentoj ni trovis multspecifajn sciindaĵojn:

1. Prospektojn pri la Sandecia Regiono Nowy-Sącz
2. Kongreslibron de 31. Tutpollanda Esperanto-Kongreso.
3. Libreton pri historio de Lodzo.
4. Libreton pri marŝipo-prinomite pri Zamenhof.
5. Libreton pri la Esperantistaj ekslibrisoj.
6. Ceterajn prospektojn pri ĉirkaŭaĵo de Lodzo.
7. Prospektojn pri ceteraj informoj.
8. Bildkartojn kaj mapon de Lodzo.
9. Prospekton pri etnografia kaj kultura riĉeco de Sandecia Tero
10. Poemojn de la pola poeto Tuwim
11. Libron de Tadeusz Ejsmont pri historio de la lodza esperanto movado.

Ni spertis dum la ekskurstagoj, ke ili ne havas forporteblan esperanto-flagon. Ni donis la nian, tiel se vi rigardas la fotojn de la ekskursoj, urbopromenadoj, vi povos ekkoni la nia-kluban miŝkolcan esperantoflagon, ĉar ĝi servis kiel vojmontrilo, por la ekskursantoj. Ni fieris, ke jen, ankaŭ ni havis rolon per nia flago, en la programo. Tiu estas videbla bone sur la fotoj. Fotoj estis faritaj ĉie. Kaj sur la stratoj dum la urbrigardaj promenadoj, kaj en la muzeoj,

kongresejo dum la programoj.

Ni estis scivolemaj: ĉu en patrujo de la pola tekstilfabrikado ankaŭ nun aĉetebblas belaj tekstilaj tablotukoj por kovri la manĝotablon? Povas esti ke ni ne bonloke serĉis. Ni trovis nur unu treege elegantan elvendejon, sed la varoj devenis el Florenco (Italio). La vendistino diris, ke en la plej multo de la vendejoj troveblas plej multe fremdlandaj varoj. Tamen, ni sukcesis trovi kaj aĉeti belajn polajn popolajn teksaĵojn, ornami nian libroŝrankajn bretojn. Fotojn ni klopodis fari ĉie, pri ĉio, kio interesa estis por ni. Krom la niaj fotoj, ni ricevis ankaŭ de s-inoj **Halina Komar, Magdalena Tatara, s-roj Andrzej Sochacki kaj Robert Kaminszky.**

Nian apartan ĝojon servis, ke ni povis ekkoni la redaktantojn de la revuo F.R.E.Ŝ.O kaj de Pola Esperantisto, krom la diversaj grupestroj kaj grupanoj el tuta Pollando kun kiuj ni havis jam retkontaktojn pli frue kaj nun venis la ŝanco por ekkoni ilin persone kaj plifortigi nian kontakton por la estonto (**ekzemple kun estro de la Varsovia Vento**).

Por ni tre plaĉis la steloj sur la trotuaro kun la nomoj de la famaj homoj kiuj ligiĝis ielmaniere al Lodzo. Krome plaĉis, ke la Poloj ne lasas ruiniĝi la malnovajn kuriojn-nobeldomojn de la estintaj riĉuloj, sed renovigas kaj uzas al kulturaj celoj, uzataj estas ankaŭ nuntempe. Belaj estis la floraj, bele zorgitaj skulptaĵaj fontanaj parkoj, da kiuj la urbo havas multe kaj tiel rompas la grizecon de la malnovaj domegoj. Plaĉis ankaŭ la bronzaĵaj statuoj, de Tuwim kaj la gaslamp-lumiganto kaj de la aliaj. Estis videblaj tie ankaŭ kulturpalaco el vitro konstruita, kaj ekroveblis multstilaj domoj. Tiuj ĉiuj estas tre-tre bonaj ideoj, gardi memorojn de la pasinto tiel, ke montru al la nuno kaj al la estonto. Plaĉis la bonodoraj sukerejoj sur la promenancelaj stratoj, sed pleje plaĉis tiu ideo, kiu ne imagebla estas ĉe ni en Miŝkolco: la pentrita ekstera dommuro, montrante la plej eminentajn Lodzanojn. Kvankam Lodzon neniam vizitis **d-ro Zamenhof**, sed lia lingvo Esperanto ĉeestas la nuntempon, ankaŭ lia figuro videblas tie sur la muro inter la famaj homoj de Lodzo.

La etoso, kiun ni finĝuis tie, tamen estas ne priskribebla. Jam ankaŭ ĉe la slovakaj geesperantistoj ni sentis la fidon kaj honorigon pro nia senegoisma poresperanta agado, sed ĉi etoso superis ĉion. Kiam prezidantino de PEA, sinjorino Halina Komar vizitis Miŝkolcon en Aprilo 2008-a, inter ni teksiĝis fortaj fadenoj de la amikeco kaj la komuna ideo-eco. En Lodzo ni trovis veran profundan homaranismon, - kaj nun mi aludas al la zamenhofa - amikecon kaj altgradan kulturitecon.

Ne priskribebla estas la sento, kiun ni trasentis tie: pri la beleco de la tuta ekkonata regiono jam de la trapaŝo de la landlimo, la pasinto kaj nuntempo de la urbo, la riĉeco de la programoj, korvarmo de niaj invitintoj, tiu fakto, ke dum la tuta tie pasigita tempo ĉiu serĉis la ŝancon por ekkoni nin, oni ofte fotis nin, multoj ĉirkaŭbrakis nin, adreson ŝanĝis kun ni, invitis nin en diversajn polajn urbojn, en ilian hejmon, en ilian esperanto klubon, ili petis nin: legu ankaŭ ni la anoncojn pri sia esperanto-vivo, agado, kaj petis nin por aŭskulti la elsendojn de esperantlingva televido de Bjalistoko, kiel la lokan televid- kaj radioprogramon de la sekvontjara UK. Ili petis nin: se ni ne povus partopreni la 2009-an UK, iru aliam, vizitu ilin iam ajn. Nur unu gravas, ke ni vizitu urbon Bjalistoko kaj la tieajn esperantistojn. Ni ne forgesu, ke ili atendas nin tien.

De la geesperantistoj ni ricevis donacojn kaj invitojn por vespermanĝi.... Kaj mi eksciis, ke same gastigis ili ankaŭ la aliajn eksterlandajn gastojn.(La italan, germanan la el Aŭstrio alvenintan, la svedan.)

Vi nun povis informiĝi el mia raporto pri la programo de la pollanda 31-a Landkongreso. Sed mi devas aldoni, ke la festa programo de la Kongreso estis ne nur bone organizita, riĉa, sed menson, koron plivarmiga, plezurigite donis al ni neforgeseblajn travivaĵojn, edifajn sentojn.

Ni estas dankemaj al la sorto, ke ni estas esperantistoj kaj ni povis havi parton en tiuj- ĉi travivaĵoj.

Kune kun mia edzino ni konas la lingvojn angla, germana krom Esperanto, sed dum nia tuta


vivo nek unu el inter tiuj donis similan travivaĵon, similan al tiu, ol uzo de ĉi internacia lingvo.

Ni dankas la inviton en Lodzon al la invitantoj. Ni vidis, spertis, ke tie partoprenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ Esperanton ne parolantaj urbestarantoj, aliaj urbanoj estante oficialaj personoj (urbestroj de Lodzo kaj de Bjalistoko).

Ĉi festo estiĝis tiamaniere ne nur de la lodzaj aŭ de la tutpollandaj esperantistoj, sed de la tuta pola popolo.

Mi diras kuraĝe, ke la 100 jariĝan feston de la lodza esperanto movado havis tuta Pollando kaj ni ĝojis, ke ni povis esti tie, por ĝoje festi kune kun ili.

László Pásztor, nome de ankaŭ Adri Pásztor



En la juda tombejo de Lodzo



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: pasztor.laszlo4@chello.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu